

DELFI DALMAU

DIALEKTO, DIALEKTIKO



BARCELONA

1956

51
3

Esperanton elparolu plej bone.

— Aŭskultu la gramofondiskon «Esperantofono». Ĝi estas moderna plej bonkvalita nerompebla.

—Prezo: 30 steloj plus 15 % por sendelspezoj.

—Mendu ĝin ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe la eldoninto:

BELPOST

Apart. 5164

Barcelona

R-61



DIALEKTO, DIALEKTICO

8-1LE

16/10/1961

La enhavo de ĉi-tiu libro estas parte aperinta en
«Scienca Revuo», «Heroldo de Esperanto»,
«La Praktiko», «La Progresanto» kaj «Boletín»

Por uzado en supera kurso de Esperanto,
interĉapitre estas paroliga demandaro.

DELFI DALMAU

DIALEKTO, DIALEKTICO

*Each individual soul
is such, in virtue of its
being a power to translate
the world into some parti-
cular language of its own.*

EMERSON

Barcelona, 1955

*Al mia edzino, mia
filo kaj mia filino, ĉiuj
favoraj al Esperanto.*

Kopirajto de la aŭtoro

Tip. STUDIUM - Viladomat, 10 - Barcelona

MIA, VIA kaj IDEALA

Mi ne povas eviti ke mia Esperanto respegulas mian spiriton aŭ personecon, kaj tial ĝi diferenciĝas de via Esperanto, kiu projekcias vian spiriton, vian personecon. Do, mia Esperanto estas nek pura nek absoluta; ĝi estas nur mia, laŭ mia lingva kapablo kaj laŭ mia senta kaj pensa karaktero. Tial mi devas peti vian indulgon. Sed: tiel malsamas lingve kaj doktrine ĉiu esperantisto, do ĉies Esperanto. Kaj simile okazas ankaŭ en ĉiuj nacilingvoj. La personaj diferencoj devas esti superataj por interkompreniĝo, agnoskante ke ili estas neeviteblaj, naturaj kaj tial akceptendaj, eĉ akceptindaj: seninteresa, monotona, teda estus homaro al ĉiu homo, se ĉiuj same pensus, sentus, parolus.

Certe, ni devas komprenemi—neniu pli surdas ol tiu kiu ne volas aŭdi. Sed pri tio ne kulpas Esperanto, sed malkomprene-maj esperantistoj. Samkiel, ne metioj fuŝas, sed malbonaj me-tiistoj—laŭ franca proverbo.

La vojo al sukceso de ĉiu granda idealo estas longa kaj malfacila: «cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, ni semu kaj semu konstante». Ankaŭ tiu fakto bezonas komprenemon. Multaj samideanoj laciĝis aŭ malvarmiĝis, senesperigis, ĉar ili trompiĝis pri la vojo.

La fakto ke ĉiu esperantisto estas diferenca kaj havas pli-malpli reliefan kaj propran personecon devas esti antaŭvidita. Ni devas ĝin kompreni kaj komprenigi por eviti malesperigon. Kiam aperas interpersonaj konfliktoj en Esperantujo—ĉu lingvaj ĉu doktrinaj—ni devas agnoski la neeviteblan diferencon pri ĉies karaktero kaj ceteraj personaj cirkonstancoj. Ni devas filozofie, eĉ ironie, persisti, malgraŭ supraĵaj konfliktoj. La fundo de nia idealo ja kunligas nin profunde. Per komprenemo, indulgemo, ni devas mildigi nian interrilatadon, eviti aŭ superi malsaĝajn kverelojn aŭ disputojn.

Rutino, inercio kaj atavismo staras fortege kontraŭ ĉiaj progresoj. Nur antaŭvide pri ĉiaj baroj, pri malesperigaj surpizoj, ni povos efike, longe, elteni ĝis fina venko, eble jam pli baldaŭ ol multaj seniluziigintoj kredis, kredas, kredos.

Iuj parolas dialekte pro supereco, eĉ kreante lingverojn; aliaj pro malsupereco, fuŝe; aliaj pro simpla diferenceco: pli-malpli riĉe, pli-malpli bele. Sed konfliktoj estiĝas pro tio, ke iuj fieruloj pretendas, ke ĉiam ili superas aŭ pravas kontraŭ aliaj. Jen kio okazis en ĉiuj lingvoj; sed ĉiuj tamen progresis, perfektigis dum la konfliktantoj kverelis. Tiel okazis dialektike pri doktrinoj, kiuj tamen progresegis.

Ni komprenemu, respektemu, por mildiĝo de interhomaj, intersamideanaj rilatoj. Ni lernu ankaŭ ĉi-flanke la Zamenhofan ekzemplon.

La moderna eminenta filozofo Richard Albert Wilson speciale pristudis la teorion de Kant pri spaco kaj tempo; pridirante ĝin, Wilson rimarkigas «as I understand Kant», t. e., «laŭ mia kompreno». Efektive, ĉiu komprenas diference. Do ĉies eldira-

do pri sama afero, nepre estas pli-malpli diferenca, kiel ĉies pentraĵoj pri sama afero — ofte des pli diferencaj ju pli eminentaj estas la respektivaj pentristoj.

Ni klopodu progresi kaj interkompreniĝi laŭ naturaj kondiĉoj, cirkonstancoj, diferencoj, laŭ senfinaj personaj dialektoj kaj dialektikoj, cele al ideale komuna Esperanto, milda, kiel tiu de Privat, firma kiel tiu de Lapenna, ekvilibra, saĝa, kiel tiu de Zamenhof.

POR PAROLIGO:

Ĉu vi povas eviti respeguladon de via personeco tra via dirmaniero aŭ tra via skribmaniero?

Ĉu vi scias pri grafologio, kion ĝi celas kaj pretendas? Ĉu vi kredas ĝian sciencecon aŭ artecon?

Ĉu parolaj diferencoj inter samlingvanoj povas esti nuance tiel grandaj kiel la respektivaj manskribaj diferencoj?

Ĉu nia idealo estu diferenciĝado aŭ kompreni neeviteblajn diferencojn? Ĉu sameco interhoma estus kontentiga solvo?

KREDO kaj VERO

Iam, en urbeto kie mi loĝis kaj laboradis kiel instruisto pri lingvoj, mi faris paroladon titolitan „Eleganteco“. Kompreneble, mi celis pritrakti elegantecon lingvan. Do, mi antaŭvidis malgrandan ĉeestantaron. Mi trompiĝis, mi havis la surprizon vidi, ke la salono pleniĝis, ke ekzistis granda, amasa interesiĝo por aŭdi min pri tiu temo. Efektive, profesiuloj pri elegantaj vestaĵoj, sinjorinoj, fraŭlinoj kaj viroj, kiuj pretendis aŭ deziris esti elegantaj venis, krom miaj konatoj, kiuj certe supozis, ke mi parolos pri lingva eleganteco. Ni ĉiam estas pli-malpli naivaj; mi supozis, ke mi estas sufiĉe bone konata de la tuta urbanaro, ke ĉiuj komprenos, ke mi priparolos lingvan temon.

Mi esperas, ke nun la fakto ke ĉi-tiu verkajo aperas en libro pri Esperanto, evitos eraron de legantoj pensi, ke sub la supra titolo oni povas pritrakti nur religian temon. Ĉu mi ankaŭ ĉi-foje estas naiva?

Ĉiuj lernantoj de Esperanto kaj multaj instruantoj kredas, ke nia internacia lingvo estas tute logika, ekzakte logika, ke la Gramatiko kaj la Vortaro, t.e. la 16 reguloj kaj la vortelemen-
toj solvas la problemon tiagrade, ke ĉiu, kiu bone lernis, formos la lingvaĵon, la esprimadon en Esperanto tiamaniere, ke la Za-

menhofa lingvo rezultos la sama efektiva rezulto. Tion eble kredas eĉ instruistoj de Esperanto kaj esperantistoj uzantaj la lingvon jam dum longe. Ordinare, ĉiuj opinias, ke la Zamenhofaj esprimoj estas neeviteblaj kaj preciza rezulto, simpla aplikado de la elementoj de la lingvo.

Nu, estas tempo konsciiĝi kaj konsciiĝi, ke tia kredo estas iluzio. En la ĉapitro sub la titolo „Justeco” k. a. mi provas komprenigi, ke eĉ se Zamenhof lingvosciencie estus elektinta proksimume la samajn elementojn de la lingvo, sed ne estus poeto, artisto pri kreado de la lingvaĵo, de la esprimoj, de la aplikado de tiuj elementoj, gravega manko minacus la lingvon, ĝian funkciadon, ĝian ekziston.

Ĉiuj lingvoj estas kreitaj de siaj famaj oratoroj kaj literaturistoj, kaj de nekonataj popolanoj, kiuj posedis la arton, la lingvan intuicion, graŭ kiu ili kreadis la esprimojn. Per la samaj elementoj, la homoj kiuj ne posedas tian kapablon ne sukcesas, nur fuŝas. Vero estas, ke Esperanto konsistas ĉefe el la de Zamenhof kaj aliaj artistoj kreita esprimaro, lingvaĵo, lingvo.

La lingvoelementoj ne estas lingvo. Tion devas profunde konscii la instruantoj de Esperanto. Esperanton scipovas ne tiuj, kiuj konas nur ĝiajn elementojn, sed tiuj, kiuj legante, aŭdante, imitante, alproprigis al si la lingvon kreitan de la poeto Zamenhof kaj ceteraj poetoj de Esperanto. La bonaj instruantoj lernigas la lingvon, la esprimojn, la frazojn, elokventajn diraĵojn: „fartu bone!”, „ĝis revido”, „kara amiko”, „antaŭen!”, kaj ĉiuj bonaj esprimoj kaj tekstoj kaj paroladoj estas la vivanta Esperanto, kiun ne povas krei, sed nur lerni — antaŭ, samtempe aŭ

post la lernado de la vortelementoj — la novaj esperantistoj kaj ĉiuj, kiuj ne estas lingvoartistoj.

Multe legi kaj aŭdi bonan Esperanton de la Majstro kaj de jam multaj bonaj verkistoj kaj oratoroj, jen plej efika vojo al posedo de tiu lingvo jam klasika kaj moderna, kreita, kreata kaj kreata de popolo kaj poetoj, laŭ evoluado de ĉiu natura lingvo.

Vere, Esperanto estas pli natura ol la esperantistoj mem kredas.

POR PAROLIGO:

Kiun sian naivaĵon, konstatas la verkinto? Ĉu vi memoras iun vian naivaĵon, aŭ anekdoton pri ies naivaĵo?

Ĉu iu ajn inteligentulo bone lerninta la Fundamenton de Esperanto kreus la samajn frazojn kreitajn de Zamenhof?

Ĉu Esperanto estas ekzakte logika? Ĉu vi scias kion etimologie signifas la vorto ekzakta?

Ĉu vi pli ŝatas kredon aŭ veron, fidon aŭ scion? Ĉu ni povas rezonadi favore al natureco de Esperanto?

NACIA kaj INTERNACIA

Centoj da kunvenoj naciaj kaj internaciaj kaj miloj da libroj en Esperanto, krom pluraj eminentuloj provintaj kaj malsukcesintaj anstataŭigi la Zamenhofan lingvón, atestas pri fortikeco kaj matureco de Esperanto, post jam kaj nur 70 jaroj de ĝia plej modesta publikigo. Tial ni povas nun sen timo kaj sen timigo aludi dialektojn kaj idiotismojn Esperantajn. — Kaj... pardonu mian troan *kajadon!*

Ne laŭ la ordinara senco de dialekto, kiel dialektoj de latina estas latinidaj lingvoj, ne Esperantidoj, lingvoj elvenintaj aŭ elvenigitaj el Esperanto, sed laŭ la senco, ke ĉiu matura esperantisto havas sian dialekton, kiel ĉiu havas sian dialektikon.

Ne malgranda diferenco estas inter la franca lingvo de Proust kaj tiu de Valéry. Tiaj personaj dialektoj ekzistas senfine en ĉiuj naturaj lingvoj same kiel en Ĝesperanto. Ne nur diferencas Esperantoj de la kataluna poeto Grau kaj de la franca Schwartz, ekzemple, sed ankaŭ tiuj de Bourlet kaj Lanti ambaŭ samnaciaj. Ne estas afero pri sama aŭ malsana nacieco. Malsamaj personaj dialektikoj estas Churchill'a kaj Perón'a, kaj malsamaj anglaj dialektoj respektivaj de Churchill kaj Eden, kaj la rusaj de Molotov kaj Viŝinski.

Kion kapablas esprimi hispana lingvo aŭ itala, kataluna aŭ franca, germana aŭ angla, Esperanto aŭ pola? Tio dependas pli ĝuste de aŭtoro aŭ tradukanto, de iu Zamenhof aŭ Bernard Shaw, Unamuno aŭ Maragall. La vivanta franca lingvo estas tiu de ĉiuj francoj, sed la franca lingvo de ĉiu franco ne estas same riĉa aŭ bela, milda aŭ energia. Rimarku, kiel malsamaj estas dialekte la du samrasanoj, samnacianoj, samjarcentanoj Heine kaj Nietzsche! Rimarku eĉ por simila dialektiko, kiel estas dialekte diferencaj Attlee kaj Bevan! Ĉiu lingvo konsistas el ĉiuj samlingvaj kapabloj personaj.

Fiziologio ne estas matematika. Ĉu lingvo, vera lingvo, ne simpla kodo, povas esti rigida, ĉiam sama, el ĉiu parolulo la sama? Ĉu plej alta rango de lingvo ne estas viveco? Ĉu vivo, viveco, vivado estas rigidaj, matematikaj? Eble jes! Sed ja ne aritmetike, simple, supraĵe, palpeble. Certe ekzistas la profunda matematiko kaj logiko de la arto kaj de la vivo, tiu kiun la simpla logiko ne konas. Tiasence ekzistas senfine multe da Esperantoj laŭ tempo, persono, matureco, paralele al natura fenomeno de ĉiuj lingvoj.

La simpluloj ne plu timu. Ili observu ĉe si tion, kio okazas en la propra lingvo. Lingvajoj pli-malpli korektaj fonetike, sintakse, semantike ĉe la amaso, kune kun la grandaj verkoj de eminentaj poetoj kaj ĉiaj verkistoj, influas, konsistigas la lingvon. Simile okazas en Esperantujo.

Rigardu grandan vortaron de via lingvo, aŭ grandan gramatikon, kaj en ili vi vidos, kiel en via lingvo, laŭ tiu aŭ alia granda aŭtoro, ĉiu vorto sencas, lokiĝas, vivas.

Ankaŭ ni, esperantistoj, havas Plenan Vortaron kaj Plenan Gramatikon, en kiuj ni konstatas, kiamaniere niaj grandaj verkistoj, ekde la majstro, uzis ĉiun vorton, ĉiun esprimon, kaj eĉ iam rektifis, kaj tiel konstruiĝis kaj konstruiĝas la ĉionesprima internacia Esperanto.

Premi, —subigi premante estas senco de *subpremi*. *Teni*, —teni de sube estas senco de *subteni*, kaj ne subigi tenante. Tamen, ambaŭ verboj estas transitivaj; premi ion, teni ion. Simplece, oni povus senfine diskuti pri kunmeto kaj senco de *subpremi* kaj *subteni*. Sed profunde, kore, vivece, tiaj kunmetoj kaj sencoj bone respondas al lingva sentado internacia. Efektive: la ĉefa elemento de *subpremi*, *premi*, ne samelemente esprimiĝas internacie, kiel *teni*; dum ĉi tiu estas: katalune *tenir*, hispane *tener*, france *tenir*, itale *tenere*, latine *tenere*; *premi*, malgraŭ latine kaj itale *premere* kaj katalune *prémer*, tradukiĝas france *comprimer*, hispane kaj portugale *comprimir*.

Simile, matematikistoj aŭ advokatoj senfine diskutus kunmeton kaj signifon de *subiri*, *supreniri*, *supriri*, *subeniri*, ktp. Feliĉe, matematikistoj devas solvi nur matematikan terminaron. Regas — por lingvo, por lingvokreado — intuicio, scio pli profunda, kiun nur poetoj, oratoroj, beletristoj, lingvoartistoj povas senti kaj obei. Gramatikistoj, poste, ekzempligas kaj analizas.

Iu eldiris, ke oni atentu la lingvon de la popolo de Esperantujo. Lingve, la esperantista popolo ankoraŭ ne estas matura kiel la naciaj.

Konklude, Esperanto absoluta, perfekta, ne ekzistas, same kiel ne ekzistas absoluta, perfekta nacia lingvo, malgraŭ ĉies bonvolo kaj devo celi perfektecon en sia lingvo.

Esperanton kaj ĉiun lingvon influas ne nur semantiko, ne nur gramatiko, sed ankaŭ belsoneco, eŭfonio kaj aliaj artecoj. Tiaj influoj evoluigas Esperanton kaj ĉiun vivantan lingvon. Plej bonaj oratoroj kaj verkistoj rifuzas, ekz. antaŭmeti prepozición Ĉe al nomo, kies komenca sono estas ĉ. Tiam semantiko postulas tiun vorteton, kaj belsoneco malakceptas ĝin. Laŭsence, *raztuko* estas bona kunmeto; sed, fonetike, z estiĝas s antaŭ t, do *rastuko*, ĉar la senvoĉa t senvoĉigas la voĉan z. Matematika lingvo ne prezentas tiajn konfliktojn, kaj ĝuste tial ĝi ne estas natura lingvo. Sed en Esperanto, kion fari? Senfine multe tiaj solvetoj formas ĉiun lingvon. Nur dank' al genieco la majstro trovis la Fundamenton, kaj poste ĝin obeis naturlingve, kiel konsciulo pri plej subtilaj leĝoj. Tion ne kapablas imagi eminentaj ignorantoj de Esperanto; kaj tial ili spriore malakceptas la Zamenhofan solvon. Lingvo estas plej homara kreaĵo, kaj nur plej homa genio, plej genia homo, povis krei lingvon, kaj inokuli ĝian spiriton al disĉiploj: envivigi Esperantujon.

La fakto, ke eĉ talentaj espe.artistoj pli-malpli *jesas*, *neas*, *famenas*, *sedas* aŭ *kvankamas* k.c., simple montras identecon de Esperanto kun la naturaj lingvoj. Nun, kiam tiel modas statistikado: kiom *deas* aŭ *elas*, *proas* aŭ *poras* ĉiu el niaj eminentaj verkistoj? — Ĉu vi mem ne tro ĉuas interparolante? Sed vera, *natura* esperantisto superas la naciajn diferencojn, de kataluno kiu *faras* kison, dum kastilo *donas* kison; de anglo kiu *prenas* promenadon, kastilo kiu *donas*, kaj franco aŭ kataluno kiuj *faras* promenadon. Ordinare, matura esperantisto simple *kisas* kaj *promenas*. Do, inter la senfinaj bonaj esperantoj de Espé-

ranto ne ekzistas tiu kiu donas kaj tiu kiu prenas promenadon! Malbona Esperanto estas malbona, ne persona dialekto. Eĉ Esperanta idiotismo devas esti Esperanta kaj ne naciligva laŭvorte tradukita. Memoru ke Zamenhof diris: „Ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj ne multaj idiotismoj; lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo sen viva kaj tro peza.”

Sed nur matura, jam matura esperantisto povas krei aŭtentike Esperantan idiotismon.

Kaj por nia lingvo, same kiel por ĉiuj ceteraj, fonto de instruo estas ĉiu majstra verko, ĉiu majstra stilo, ĉiu persona majstra dialekto esperantista.

POR PAROLIGO:

Ĉu paroluloj ĉiuj same kajadas, sedas, ĉuas, tamenas? Ĉu vi same dialektikas, kiel viaj samfamilianoj, samreligianoj, sampatrujanoj?

Ĉu pentristoj aŭ muzikistoj, samartanoj, same argumentas? Ĉu du eminentaj verkistoj aŭ oratoroj estas lingve egale klaraj aŭ elokventaj?

Kio estiĝis antaŭe, via lingvo aŭ ĝiaj Gramatikoj, Vortaroj? Ĉu vi unue lernis paroli aŭ analizi vian lingvon?

FILOZOFOJ kaj FILOLOGOJ

Filologoj ofte kontraŭstaras Esperanton pro la fakto ke ĝi ne estas rezulto de spontanea lingva evoluo; Vossler estas plej elstara reprezentanto de tia opinio, kredo, antaŭjuĝo. Humboldt asertis ke lingvaĵo rezultas el konstanta mensa laborado celanta mastri sonojn por ebligi esprimadon de pensoj. Tiel aperas la nomata lingva idealismo; sed dum Vossler precipe vidas ĉi-rilate lingvan evoluon, Croce vidas lingvan kreadon. Evolucion montras la francaj *eau* kaj *août* el la latinaj *aqua* kaj *augustus*; la hispana *lunes*, kataluna *dilluns*, franca *lundi*, itala *lunedì* el la latina *Luna dies*, aŭ la angla *Monday* kaj germana *Montag* el la saksa *mónandaeg*. Kompreneble, evoluaĵo ampleksas ne nur vortojn sed frazojn, ne nur morfologion sed sintakson, ne nur gramatikon sed ankaŭ semantikon. Kreado estas, ekzemple, por naztuko, la kataluna *mocador*, hispana *pañuelo*, franca *mouchoir*, itala *fazzoletto*, angla *handkerchief*, germana *Taschentuch*. Kreado ankaŭ ampleksas la tutan lingvon.

Sed vere rimarkinda estas tio, kion diris Balmes, la kataluna filozofo, jam en la unua duono de la XIX^a jarcento: «Rilateco de la fundamenta ideo kun la vortradiko estas efika helpo por

memorado ; ĉar por ekono de ĝiaj modifoj sufiĉas atenti la vortojn. La literoj am memorigas ideon de amo ; kaj la malsamaj sufiksoj aŭ finiĝoj post ĝi montras la modifojn. Se ĉiuj modifoj esprimiĝus per vortoj, kiuj ne havus komunan radikon, tre malfacile estus ilin memorteni. Sed ankaŭ la sufiksoj aŭ vortfiniĝoj estus malfacile reteneblaj, se ili ne rilatiĝus al la respektivaj modifoj. Tial oni vidas multajn similajn finiĝojn, kiujn oni povas klasifiki. »

Tiel rezonadis Balmes antaŭ pli ol unu jarcento, kaj tiel rezonadis, poste, Zamenhof por kreado de internacia lingvo. Kaj, eĉ detale; malgraŭ ke en ĉiuj latinidaj lingvoj la verbaj formoj varias ne nur laŭ tempoj sed ankaŭ laŭ singularo, kaj pluralo, kaj laŭ unua, dua kaj tria persono, kaj tial ordinaraĵ hispanaj «gramatikoj» ĝin difinas kiel vorton kiu akordiĝas al tempoj, nombroj kaj personoj, Balmes ĝin difinis: « Verbo estas gramatika formo kiu esprimas ideon modifeblan laŭ tempoj. » Kaj plie li precizigis ke « la vortmodifoj pro nombroj kaj personoj ne estas verbokarakterizaj ». Do, li konkludis, kiel Zamenhof, ke nur laŭ tempoj malsame finiĝu la verbaj vortoj.

En pli profunda lingvistika rezonado, Balmes asertis : « Evidentas ke parolo ne estas *natura* signo de ideo, sed *arbitra*. Tion pruvas la fakto ke ofte ne ekzistas simileco interilata; kaj tion konfirmas la realo, ke sama ideo estas esprimita per malsamaj vortoj laŭ diferencaj lingvoj : *domus, maison, house, casa* estas vortoj malsimilaj, kiuj tamen signifas saman ideon. » Nur post multaj jaroj, ĵus en la nuna jarcento, la fama lingvisto F. de Saussure publikigis sian teorion pri arbitreco de la lingva signo.

Croce, la eminenta itala filozofo, ankaŭ asertis: « milionoj da lingvokreantoj, milionoj da lingvokreaĵoj, ne nur plej eta frazo sed eĉ literatura verko plej profunde pensita; ĉiu libera, ĉiu aŭtonoma kaj memstara ».

Tiuj asertoj puŝas min pritrakti iomete la lingvistikon de Esperanto aŭ Esperantologio. La internacia lingvo ne povas prezenti evoluon kiel *aqua > eau* aŭ *morf > form*. Ne povas ekzisti analfabeta esperantistaro, analfabeta esperantista popolo, anonimaj popolpoetoj aŭ lingvokreantoj. Esperanto estas lernigata kulture. Ĝi estas ne nur internacia lingvo, sed kultura lingvo ekde sia komenco. Tiel malprobabla estas evoluo de kulturvortoj — *aritmetiko, teatro, astronomio, literaturo, fonetiko, gramatiko* — en ĉiuj naciaj lingvoj, kiel evoluo de ĉiuj Esperantovortoj. En la internacia lingvo ĉiuj vortoj estas kulturaj, same *akvo* kaj *formo*, kiel *teatro* kaj *poezio*. La naciaj lingvoj estis kreaĵoj, kiam ne ekzistis libroj, ĵurnaloj, popola legado kaj skribado. Esperanto estas nuntempa, kiam kulturo estas popola, kiam radio el ĉiu lando estas aŭdata en la aliaj.

Tamen, se ne palpebla, videbla, ĝenerala evoluo, t. e. rapida, ordinara evoluo, estas eĉ neevitebla ia speciala evoluo — kaj diskutetoj pri vortoj kaj frazoj. Sed ni ja devas esti singardemaj, zorgemaj, studemaj, atentemaj. Feliĉe, ni posedas Zamenhofan verkaron kaj doktrinon. Feliĉe Zamenhof estis verkisto, poeto kaj filozofo. Plej bonaj verkistoj hodiaŭaj kaj estontaj ĉiam imitos la Majstron. Kaj tia imitado estas des pli konsilinda, ke neeviteble ĉiuj homoj, ĉiuj esperantistoj estas diferencaj, kaj ĉiu havas propran dialektikon kaj propran dialekton! Do, inter ni estu pleja prudento kaj pleja respektemo.

La fama hispana verkisto Juan Valera, en siaj intimaj leteroj publikigitaj, plendis ke multaj recenzistoj konstatis ke ĉiuj roluloj en liaj verkoj parolis kiel li, ne scipovis alian manieron. Tio estas, laŭ mia esprimo, tiu aŭtoro ne povis eviti sian personan dialekton, dialektikon. Sed kiu verkisto eĉ eminenta, ofte ju pli eminenta des pli evidente—ne estas rekonebla tiel en ĉiuj siaj verkoj? Kaj kiam Valera estis jam maljuna, fine de la XIX jarcento, la recenzistoj estis legintaj multajn verkaĵojn liajn, kaj, kompreneble, ili facile konstatis en ĉiu nova, lian personecon. La recenzistoj estis malpravaj pretendi alian fakton.

Kiel Balmes estis filozofo, Valera estis beletristo, artisto. Mi plezure konstatis koincidon de Balmes kaj Zamenhof pri lingvosento gramatika, lingvistika. Mi rimarkigu kiel nia majstro ankaŭ profunde sentis la lingvoarton kiel Valera, cetere kiel Lope de Vega kaj ĉiuj grandaj verkistoj. En siaj intimaj leteroj li ankaŭ asertis: «ĉiuj artoj iel similas poezion, kiu ekzemplas por ĉiuj aliaj». Kaj ĉi-rilate li rimarkigas ke ne la gramatikistoj, sed la poetoj, lingve kreas. Zamenhof estis tiel kompleta genio por lingvo, ke li klare vidis kiel filozofo kaj profunde sentis kiel poeto. Tial li sukcesis super ĉiuj kreintoj de internacia lingvo.

POR PAROLIGO:

Ĉu sen bona kono pri lingvaro, Zamenhof malkovrus ĝian profunde komunan gramatikon por Fundamento de Esperanto?

Cu eble ĉiu arto, ĉiu scienco, havas propran specialan harmonion, ritmon, matematikon? Ĉu bela nazoformo estus bela formo por orelo?

Kio okazas al z ĉe kunmeto nazformo? Kial?

Ĉu lingvo konsistas el sendependaj vortoj aŭ sendependaj vortelementoj? Kie fontas beleco kaj riĉeco de lingvo?

Ĉu idiotismoj, lingvaj konfliktoj, estas tute eviteblaj en iu ajn lingvo? Ĉu lingvo estas sendependa de homa kaj homara biologio, fiziologio, psikologio?

Ĉu lingvo estas materio aŭ funkcio? Kion vi konsentas aŭ malkonsentas pri la enhavo sub titolo «Nacia kaj internacia»?

Kiel similas kaj kiel diferencas evoluo de esperanto kun evoluo de naciaj lingvoj? Kial?

Ĉu decimala sistemo estas rezultato de kreo aŭ de evoluo? Kion asertas Gumboldt pri kreiĝo de lingvo? Ĉu via lingvo prezentas diferencigojn pro evoluo?

Ĉu en via lingvo estas samfamiliaj vortoj montrataj per komuna radiko, kun malsamaj afiksoj? Kiu precipa vario karakterizas verbojn?

POLITIKAJ SOLVOJ

Kompreneble, mi ne intencas kontraŭstarigi eminentulojn unu al alia — fama hispana profesoro, jam mortinta, konservativa brita ĉefo kaj komunista rusa gvidinto. — Kontraŭe, mi deziras elstarigi similecon de ilia opinio pri lingva — interlingva — problemo.

Kiam antaŭ dudek jaroj en Hispanio la ĉefaj politikistoj kaj intelektuloj multe diskutis pri rekono de la kataluna lingvo, la hispana, kastillingva verkisto kaj profesoro Miguel de Unamuno multe laŭdis katalunajojn, sed esprimis sian opinion ke pri la lingvoj en Iberio estas espereble ke ĉiuj kunfandiĝos en komunan modernan iberian lingvon. Ĉu li vere tion kredis? Mi ja dubas pri tia kredo lia. Li bone sciis ke la baska tute diferencas de la aliaj; kaj ke la tri aliaj — kastila, portugala-galica kaj kataluna — multe pli diferencas inter si en nia tempo ol antaŭ jarcentoj. Do, kial li asertis kredon pri mala evoluo? Certe pro deziro ke la katalunoj kaj la galicoj kaj la baskoj rezignu bone lerni kaj priokupiĝi pri sia respektiva lingvo, kaj la kastila daŭru kiel la sola kulturlingvo en Hispanio, kvankam ne en la tuta Iberio, pro la sendependeco de Portugala lando. Lia aserto simple kaŝis lian kastilismon.

En 1950 Stalin, multe pli obeiga, en „Pravda“, responde al Marr, asertis: „Por neniu estas sekreto ke la rusa lingvo servis la kapitalisman kulturon, kaj de post la Oktobra Revolucio ĝi same servas la socialisman kulturon. Tio povas okazi nur tiel. La lingvo estas kreita, por tiu celo: por servi la socion kiel komunikilo inter ĉiuj membroj de la tuta socio, Ja ne decas, post ĉiu revolucio detrui la strukturon de ekzistanta lingvo, ĝian sintakson kaj ĝian fundamentan vortaron por anstataŭigo per aliaj.“ Post tiu konservativa prilingva obeiga opinio de Stalin, la rusa ĉefo ankaŭ asertis: „...post la venko de komunismo kunfandiĝos la lingvoj en unu lingvon komunan.“ Kaj per pli precizaj frazoj, responde al Ĉolopov, li ankoraŭ diris: „...la zonaj lingvoj kunfandiĝos en unu komunan internacian lingvon, kiu kompreneble nek estos la germana, nek rusa, nek angla,— sed ĝi estos lingvo nova, kiu absorbis en sin la plej bonajn elementojn de lingvoj naciaj kaj zonaj.“ Stalin ŝajnis esprimi opinion supernacian, kiel tion ŝajnis Unamuno; sed profunde Stalin pensis ke, post universala venko de komunismo, la prestiĝo de la rusa lingvo estus tiel granda, ke ĉie en la mondo oni ĝin studus, kaj ĝi fariĝus la internacia lingvo. La intima sento de Stalin pri komuna lingvo estas la sama kiel tiu de Unamuno. Sed ambaŭ aŭtoroj bone sciis ke por tia evoluado de la diversa lingvaro necesus lingva longepoka kaoso, tute neeble en la nuna kulturo de la civilizita homaro.

Churchill, kiam la anglalingva mondo aperis baldaŭ venkonta en la milito kontraŭ la Hitleraj, faŝistaj kaj japanaj imperialistoj, provis alian pilolon por akceptigi la anglan lingvon plej tutmonde: la „Basic English“, kaj ĝin rekomendis al ĉiuj

popoloj en publika parolado. Eĉ Bernard Shaw, provis ŝovi la anglan sub „Basic English“ (Preface in „The Miraculous Birth of Language“ by R. A. Wilson).

La esperantistoj, ni, kiuj ne pretendas malrespekti iun ajn nacian lingvon, sed utiligi Esperanton kiel *duan* lingvon de ĉiu popolo, ne bezonas konfuzigi la mondan lingvaron por aperigi novan el kaoso, ne bezonas kaŝi nian aferon, nian celon kaj veran intencon en belaspekta pilolo, sed ni povas plej klare kaj sincere propagandi nian nudan kaj tutan veron, senton, intencon.

Mi estas principe konvinkita ke oni devas ne malami, kaj persone mi estas eĉ malkapabla malami.

Sed mi kredis utile montri kiel iuj eminentuloj—unu „orienta“ kaj tri „okcidentaj“ — intencas pravigi ke ili ne akceptu Esperanton, el diversaj starpunktoj, ĉar mi konstatis ke iuj esperantistoj foje dubas, ĉu tiuj elstaruloj pravas kontraŭ Esperanto. Kaj ni devas antaŭvidi tian eventualan malvarbeblon, klarigante al niaj gesamideanoj, kial tiuj eminentuloj ne akceptas aŭ malakceptas Esperanton.

Se ni estus elstarigintaj la mirindon de la ortografio de Esperanto, eble ni estus evitintaj ke samideanoj proponus modifojn, kontraŭ ĉia profito.

Se ni estus pli ofte laŭdintaj la profundan internaciecon de Esperanto, kaj ĝian gravecon por helpa internacia lingvo, eble ni iel evitus ke eĉ „samideanoj“ amindumas „okcidentalajn“ solvojn, kun celo trudi nur „okcidentalan“.

Ni devas antaŭvidi riskojn, danĝerojn, eviti miskomprenojn kaj trompojn, fortikigi niajn samideanojn, por ke ili ne facile

ĉalu je puŝo de deklarioj kaj aliaj „solvoj“ pli-malpli imagaj, pli-malpli sinceraj, pli-malpli personaj aŭ partiemaj.

Ni devas, pli efike ol ĝis nun, atenti higienan kaj fortikigan lingvan atmosferon en Esperantujo.

Mi ja tion diris ne kiel „okcidentano“, sed kiel homarano.

POR PAROLIGO:

Ĉu ekzistas samsignifaj vortoj kun malsamaj radikoj? Kial? Kion asertis Croce (Kroĉe) pri lingvokreaĵoj kaj lingvokreaĵoj?

Ĉu vortoj **poezio**, **teatro**, **algebro**, esta malsamlingve tre similaj? Ĉu **seĝo**, **rivero**, **manĝi**, **iri**, **bela**, **maljuna**, **postuko**, pli multe diferencas? Kial?

Ĉu filozofoj kaj politikistoj havas semprincipan celon pri interlingvo? Ĉu okcidentanoj kaj orientanoj povas koincidi pri la principo?

Ĉu politiko povas influi kontraŭ moralo? Ĉu politikistoj kaj religiuloj ŝatas neŭtralecon? -

Ĉu granda venko aŭ granda malvenko povas influi kontraŭ certa vidpunkto?

ANGLA, FRANCA kaj ESPERANTO

Malfacile estas al homo eviti sin kredi superulo, tuj kiam cirkonstancoj favoras lin. Tro facile estas al popolo sin senti nevenkebla, tuj kiam ĝi kredas eble estiĝi la mastro, ĉu lingve, ĉu komerce, ĉu milite. Fiero estas terura malamiko de homo kaj de popolo. Pro fiero oni blindiĝas, ne plu vidas la ĝeneralon, kiel malfacile vidas arbaron situantan malantaŭ arbo. Plej inteligentaj homoj, plej civilizitaj popoloj viktimas pro tiu morala malvirto. Churchill kaj Stalin kredis respektive ke la angla, ke la rusa, devas esti la moderna universala lingvo. Ili satis ignori la historion pri la greka, la latina aŭ la franca, Esperanto malutilas al nacia plezuro trompi kaj trompiĝi pri internacia ĝenerala lingvo.

Eĉ malantaŭ dulingvisma etiketo, anglo pensas: „Mi povos ĉiam paroli aŭ skribi angle,” kaj franco: „Mi povos ĉiam paroli aŭ skribi france. Do, unulingvismol, aktiva unulingvismo por mi!” Alinacianoj lernu paroli kaj skribi duan lingvon, kompreni trian. Tial, eĉ eminenta franco konfesanta sian malkapablon uzi anglan, kaj eminenta anglo same pri franca, ambaŭ partiemas tian dulingvismon.

INDIVIDUA AVANTAĜO

Sed aliaj, krom franco kaj anglo, ankaŭ povus akcepti du-lingvismon, en kiu ne estas ilia propra lingvo. Ekzemple, slavo aŭ germano kun granda talento por lingvoj konsiderus persona privilegio super ordinara homo, ke ili povas konsenti du-tri-lingvismon; kiel eksterordinara fortulo volonte konsentas ke forto rajtigas venkon en interhomaj konfliktoj. Nur esperantista moralo, nur interna ideo de Esperanto, povas konvinki kontraŭ individua interlingva avantaĝo, kiel esperantistaj anglalingvanoj kaj franclingvanoj komprenas, konscias, rifuzas maljustecon de solvo speciale favora al homoj, kies lingvo estas angla aŭ franca.

UNIVERSALA KAJ FACILA

La homara mezo inter Novjorko kaj Tokio, tra la universala lingvaro por kulturo kaj civilizo, estas proksimume la naskiĝloko de Zamenhof, kaj li sin sentis homarano por helpa lingvo internacia de ĉiuj popoloj. Tial li serĉis komunan lingvan fundon por Fundamento de Esperanto, kaj lingvan logikon inter naciaj lingvoj. Tiel li alvenis laŭeble al meza lingvo, kaj tial plej facila samtempe por iuj kaj aliaj lingvanoj. La internacia uzo de naciaj modernaj lingvoj famigis italan konkludon *traduttore, traditore*; kaj tragediajn aŭ ridindajn miskomprenojn. La 1953 decembra numero de „Linguist“, el Londono, enhavas instruan artikolon, „Les gâtés de la Traduction“, kiu ilustras mian aserton.

Ĉar Esperanto ne estas matematiko sed lingvo, ĝi ne estas, ne devas esti, matematike logika, sed lingve logika. Kaj tial, samkiel pri ĉiuj naciaj lingvoj, oni devas lerni Esperanton pli atente al frazoj ol al vortoj, ĉar tiuj ĉi sence preciziĝas precipe

en frazoj, en vivanta, socia lingvero. Tial ankaŭ en Esperanto estiĝos idiotismoj; sed la „esperantismoj“ estas mezaj kaj malmultaj, dum „naciismoj“ estas ekstremaj; do, ĉi-tiuj tre malfacilaj, —kaj tre multnombraj.

KULTURFONTOJ

Feliĉe, estas en la mondo nun multaj kaj gravaj kulturlingvoj, multaj kulturfontoj, kaj la samlingvanoj de Cervantes, de Dante, de Tolstoj k.a. malvolonte rigardos dulingvan trudon aŭ proponon, en kiu ne estas hispana, itala, rusa, kiel solvon por tutmonda, interkompreniĝo. Nuntempe, nur justa, ĝenerala solvo, estas konsentebla, nur esperantista solvo — tiel justa por ĉinoj kiel por danoj aŭ katalunoj, por araboj aŭ grekoj aŭ slovakoj.

Ja sufiĉa avantaĝo estas por samlingvanoj de Eisenhower kaj de Mao-Ce-Tung, ke tiom da homoj estas ililingvaj. Gratulon al ili pro tiu fakto! Sed neniu pretendu ankoraŭ novan privilegion. Ĉiuj konsentu neŭtralan lingvan fundamenton por ĝenerala solvo.

POR PAROLIGO:

Ĉu tre diversa aŭ granda lingvaro povas facile evolui al komuna lingvo?

Ĉu antaŭ kvin jarcentoj, la modernaj parencaj lingvoj estis pli similaj aŭ pli malsimilaj ol nuntempe?

Ĉu esperantistoj devas esti kuraĝaj kontraŭ partioj kaj nacioj? Ĉu ni favoru ian privatan profitejon kontraŭ ĝenerala konveno?

Ĉu ni devas elstarigi internaciecon, neŭtralecon kaj regulcon de Esperanto? Ĉu ordinare, politikaj solvoj estas justaj?

Kion pravas la politika historio de latina kaj franca lingvoj pri internacia aŭ helpa lingvo?

Ĉu hispanlingvanoj, german-, rus-, ĉin-, povas konsideri justa solvon por interkompreniĝo per dulingvismo angla-franca?

Kiu malvirto plej danĝere logas homojn kaj popolojn? Ĉu forto rajtigas venkon inter homoj kaj popoloj?

Ĉu perforta venko efikas morale por ĉiam? Ĉu pli valoras venko aŭ konvinko?

Ĉu avantaĝo por kelkuj rajtigas konkludon kontraŭ plej multaj? Kial la logloko de knabo Zamenhof lin influis favore al justa kaj ĝusta interlingvo?

Kiel oni pli bone lernas lingvon, ĉu per vortoj aŭ per frazoj? Kiu itala frazo esprimas danĝeron pri traduko? Ĉu vi iam konstatis aŭ legis pri fuŝaj tradukoj?

ESPERANTO KIEL SOLVO. PASIVA POLIGLOTISMO KIEL INTERSOLVO.

ENKONDUKO

Kiam mi estis dekses-jara, komence de la nuna jarcento, mi eklaboris, mi fariĝis profesiulo, en medio de lingvolemigado, en interlingva medio: *Berlitz School of Languages*. Karakterizo de tiu lernejo: ke instruanto lernigas nur sian nacian, naturan lingvon. Mi fariĝis sekretario kaj instruisto en tiu internacia lingvejo, en tiu Babelo. Mi instruis hispanan lingvon al eksterlandanoj (en Barcelono). Kvankam mia gepatra lingvo estis la kataluna, mia kultura lingvo estis la kastila, la reĝa, sola oficiala lingvo en lernejoj en Katalunujo, kiel la franca lingvo estis en Flandrujo, la serba en sudslavaj landoj, la rusa en ĉiuj nacioj regataj de la Caro.

Tiam, nur politike altrangaj, nur caraj, imperiestraj, reĝaj, stataj lingvoj estis oficialaj, uzataj por instruado kaj regado, kulturo kaj politiko, kun la escepto svisa, kiu estis stranga al tiu mondo, kiel strangaj estis homoj pledantaj por respekto, rekono,

rajteco de popolaj nestataj lingvoj. (Aliflanke mi estis loĝinta, spirinta, vivinta, kiel infano 4-12-jara, en kastillingva Respubliko Argentina.

Dum kvar jaroj, agante kiel sekretario kaj instruanto en la Barcelona "Berlitz School", mi spertadis aktivan internacian poliglotismon: miaj ĉiutagaj rilatoj estis kun francoj, angloj, germanoj kaj italoj, al kiuj mi instruis kastilan, kaj kun hispanaj lernantoj de tiuj lingvoj instruataj de anglaj, francaj, germanaj, italaj kolegoj miaj en tiu lernejo. De tiam, mi ĉiam poste interrilatiĝis kun instruantoj kaj lernantoj pri lingvoj en pluraj landoj. Do, preskaŭ kvindekjara konstataĵo pri la sekvoj kaj efikoj de lingvo-lernado kaj instruado.

LINGVOSCIOJ

Ne estas nur unuspeca sciado de lingvoj. Estas kelnero, kiuj parolas tri kvar lingvojn kaj legas, skribas nur la sian; dum filozofoj, psikologoj, fizikistoj, verkistoj legas, vide komprenas kvar, kvin lingvojn kaj parolas nur unu. Tamen, ĉiulande en lernejoj, ĉu privataj ĉu oficialaj, oni ĝenerale pensas ke lernigado aŭ lernado de lingvoj rilatas ĉiam identan, ĝeneralan scion: kompreni kaj paroli, legi kaj skribi. La universala fakto ke la rezultato estas 90 % malsukceso de tia agado, preskaŭ neniel influis tian instruistaran kaj lernantaran pretendon. La fakto ke multe pli facile oni lernas lege, vide, kompreni tri fremdajn lingvojn ol samamplekse skribi, verki en unu, ŝajnas tute ne rimarkinda, kvankam tiel rimarkebla!

KULTURLINGVOJ

Se antaŭ longtempe estis en Eŭropo nur du-tri kulturlingvoj: greka, latina, araba, poste stariĝis multaj, ĉiuj modernaj ŝtataj; kaj nuntempe, ne nur la ŝtataj, sed ankaŭ preskaŭ ĉiuj naciaj, estas kulturlingvoj. Memoru kiom da lingvoj estis nerekonataj antaŭ la falo de la rusa caro kaj de la aŭstria imperiestro. Feliĉe en Eŭropo restas preskaŭ nur la kataluna lingvo nuntempe forpelita el ĉiuj lernejoj en sia popolo. Eĉ la romanĉa lingvo parolata de popolo kiu estas centono de la katalunlingva, fariĝis rekonata kulturlingvo en ĝiaj lernejoj. Tio signifas ke antaŭ 20 jarcentoj dulingvulo estis poligloto kaj nun meza poligloto devus esti tri-kvarlingva.

REZULTOJ DE POLIGLOTISMO

El centoj, el miloj da poliglotoj, mi nur escepte renkontis iun, kiu flue kaj korekte parolis duan; ja ne trian aŭ kvaran sed nur duan lingvon. Kontraŭe, mi konstatis ke, se iu tiel multe praktikis duan lingvon, ekzemple tial ke li dudek-tridekjare loĝis, vivis, naturiĝis en la lando de la dua lingvo, kaj preskaŭ nur ĉi-tiun uzis, li ĝin parolis kun nekaseblaj influoj de la unua, de la nacia lingvo, eĉ kiam ĉi tiun li ne plu kiel naciano parolis, eĉ kiam li ĉi tiun preskaŭ tute jam forgesis. Kaj ĉe poliglotoj okazas ke, kiom pli da lingvoj ili uzas, tiom pli malriĉiĝas ĉe ili la uzata esprimaro—vortaro, frazaro—en ĉiu lingvo.

La verkisto Oriol de Montsant el Buenos Aires plurfoje jam asertis ke en la argentina ĉefurbo la nacia lingvo malriĉiĝas pro la enfluo de malsamlingvanoj eksterlandaj. En la ĵurnalo „La Vanguardia“, Barcelona, 7 aŭg. 49, liaj vortoj pri tiu fakto

estis: „el idioma se está reduciendo cada día más a un español básico”.

Apud tiu malriĉiĝo okazas, kontraste, ke duobligas esprimfontoj kaj vortsencoj—hibridiĝo. Ekzemple: hispanaj *journalistoj*, kiuj iris al anglalingvaj landoj, post kelkaj jaroj, anstataŭ nur *magnífico*, ankaŭ uzas la formon *magníficente*; kaj anstataŭ nur la senco de la hispana vorto *informal* (malakurata, malserioza), ankaŭ atribuas al tiu vortformo la senco (familiara, neformala), kiun ĝi havas en angla lingvo. — Morfologia kaj semantika hibridiĝo. — Ĉiuj gramatikistoj tiun fenomenon konsideras malfortiga por lingvo, kaj se ĝi tre multe ripetiĝas, ĝi riskigas la sanon, la vivon mem de lingvo, kiel okazis al la latina en Eŭropo, kaj al la nederlanda kaj angla en Sudafriko.

Kiel poligloto kaj profesoro de lingvoj, mi konstatis tiom da hontigaj eraroj propraj kaj aliulaj, ke mi konkludis ke estas nur unu vojo por ilin eviti: minimuma aktiva poliglotismo, maksimuma pasiva poliglotismo.

Dum printempo pasintjara ludadis en Barcelona kun siaj kunludantoj la fama franca aktoro Louis Jouvet. Barcelona kelnero-poeto lin nomis en franca lingvo „cathédralique de la langue française”, celante elstarigi lian profesorecon, lian majstradon de la franca lingvo. Louis Jouvet, laŭ raporto de „France Soir” (Paris, 18.5.1950), komprenis ke eble la adjektivo „cathédralique” rilatis lian korpan grandon, katedralan grandon. La hispana poeto uzis la vorton „cathédralique” kun senco de profesoro, kiun havas la hispana *catedrático* kaj la kataluna *catedràtic*. Tiu kataluna poeto estas nomata Blanquer, kun fina litero *r* kiel la germana Müller, la angla Miller aŭ la franca Boucher.

Sed ĉar estas multaj kastilaj familinomoj kiel Pérez, havantaj z kiel lastan literon, "France-Soir" kredante, ke hispane tia nomo devas finiĝi per z, korektis (!) Blanquer per Blanquez, t.e., kastiligis la katalunan Blanquer.

Tio memorigas min pri veraj fuŝaĵoj en Esperantujo, pro pretendo de samideanoj ke ili konas la hispanan lingvon. En Hispanio estas baska lingvo, vera trezoro por filologoj, kaj kataluna kaj la galica aŭ portugala, krom la kastila, same kiel en Belgujo estas du kaj en Svisujo estas kvar. Tamen en la grava verko "Enciklopedio de Esperanto" ĝiaj aŭtoroj, dezirantaj informi pri fonetiko de la hispanaj nomoj, konsideris ĉiujn kiel kastilajn; kaj estas ridinde, ke por la katalunaj, ekzemple, in kiuj *j*, *g*, *c*. *z* sonas kiel en franca, la *x* plej ofte kiel franca *ch*, la kataluna fina *ch* kiel *k*, la poliglotoj verkintaj tiun Enciklopedion, ĉiujn elparoligas laŭ la respektivaj kastilaj fonemoj, kiuj estas tre diferencaj.

Ankaŭ mia kastillingva kolego Régulo Pérez jam publike plendis pri fuŝaĵoj kontraŭ la kastila lingvo.

Poliglotoj, ĉu estu niaj aktivaj lingvoj nur ĉies unua, kaj la dua la komuna Esperanto? Ĉiujn aliajn, ĉu multajn aŭ malmultajn, ne pretendu aktive, sed nur pasive posedi? Kaj eĉ nur tiagrade, ne imagu, se ni konas unu lingvon parolatan en Hispanio aŭ en Rusio, ke ni konas fonetike ĉiujn lingvojn parolatajn tie.

SPIRITO KAJ MEMORO

Estas popoloj landlimaj, kiel la baska, la kataluna, la flandra k.a., en kiuj du lingvoj konekzistas, kaj tiu fakto kredigis pri

homoj dulingvaj, pri natura aŭ nacia dulingveco. Tia penso, tia opinio estas erara, same kiel opinio ke poligloto povis esti normala, natura lingvulo; ke multlingvulo scipovas ĉiun lingvon, kiel la sian uzas kaj sentas monogloto. Pensado kaj sentado identiĝas kun propra lingvo. Tio ja ne signifas ke lingvo limigas pensadon. Ramon Llull ampleksigis la katalunan lingvon, kiel Dante la italan, Shakespeare la anglan, Cervantes la kastilan, Goethe la germanan, kaj tiom da francoj, rusoj, k.c., ĉiu la sian, laŭ postuloj de propra pensado kaj sentado. Sed ĉiu ampleksigis sian lingvon laŭ la spirito, la stilo, la morfologio, la sintakso kaj ceteraj karakterizoj de ĉiu lingvo. La esenco en ĉiuj tiuj pens-sentadoj-lingvoj estas la sama. Sed ĉiu havas sian spiriton, sian personecon, kiel, cetere, ĉiu aŭtoro. Kaj konfliktas, en unuhoma pens-sentado, du lingvaj sistemoj, du lingvoj. Kiel homo ne povas normale, nature, diri "miaj animoj", li ankaŭ ne povas diri "miaj lingvoj". La natura, normala, universala estas "mia lingvo", kiel "mia animo" — unu! Tial ĉe plurlingvuloj, eĉ plej simplaj — dulingvuloj — memoro anstataŭas spiriton por lingvuzado. Ju pli da aktiva poliglotismo ĉe homo, des pli da lingva memorado anstataŭ lingva sentado. Ĉe aktiva poligloto la memoro estas lia lingvujo, dum ĉe normala parolulo la propra lingvo estas en la spirito.

ĈE DULINGVULOJ

En mia verko "Poliglotisme Passiu" estas multe da citaĵoj pri konfuziĝo de lingvoj ĉe dulingvuloj: kastil- kaj katalunlingvanoj. Ĉi tie mi raportos nur du.

Fama kataluna politikisto, Cambó, kiu, malgraŭ sia katalu-

neco, atingis ministran postenon dum la Monarkio de Alfonso XIII-a, estis vigla, lerta oratoro. Li lernis, li studis nur per kastila lingvo en la elementaj lernejoj, en la mezaj lernejoj kaj en Barcelona Universitato, ĉar la kataluna estis en ĉiuj malpermesita. Do lia kulturlingvo estis la kastila. Tamen ĉiam, kiam li paroladis, oni povis tuj rimarki lian malpuran kastilan fonetikon pro influo de lia gepatra kataluna lingvo, kiu, kompreneble, ankaŭ makulis vortaron kaj sintakson de lia dua lingvo. Sed lia talento, lia elokventeco, imponis, kaj en la Hispana Parlamento oni respektis lin. Unu el liaj memorindaj katalunismoj, kiujn li uzis en kastila lingvo estis la vorto *estridencia* (malmildo). Ĉar li ne posedis la spiriton de la lingvo, ĉar li vere ne posedis la lingvon kiel nacio, kiel kastilo, kiam li volis diri substantivon de la kastila adjektivulo *estridente*, li faris ĝin; se, ekzemple, el *presidente* — *presidencia*; el *conveniente* — *conveniencia*; el *estridente* — *estridencia*; tamen la kastila substantivo estis *estridor*, kaj ĉiuj kastiloj hejme aŭ lerneje tiun formon aŭdis, kaj poste ĝin en socio kaj libroj reaŭdis kaj legis. Do ili ne povas trompiĝi. Sed katalune la celita vorto estas *estridencia* kun senco *malmildo* apud la formo *estridor* ankaŭ kataluna nur por akra bruvo, sono. Kaj ĉar Cambó ne celis ĉi tiun specialan signifon, sed pli ĝeneralan: akreco de agado aŭ idealo, li uzis *estridencia*, kiu ne ekzistis, anstataŭ unu el vere kastilaj esprimoj por tiu senco. Kaj Cambó ĝeneraligis en kastila lingvo tiun vorton.

Alia katalunismo, kiu tute ĝeneraligis en hispana lingvo, estas *hilatura*. La teksindustriistoj kiuj plejparte estas en Katalunujo, devigitaj uzi por publiko kaj ĉiuj oficialaj dokumentoj la

hispanan lingvon, faris la kastilan (?) vorton *hilatura*, ĉar ili konjektis ke, se al kataluna vorto *fil* korespondas kastele *hilo*, por *filatura* oni devas diri *hilatura*; kaj ili trompigis, ĉar la modernaj aŭ teknikaj formoj en kastila lingvo ne anstataŭigis la etimologian *f* per *h*, kaj tial la kastila forma de *filatura* estas ankaŭ *filatura*, kiel *filiat*, *ferruginoso*, *fornáceo*, *filiforme*, *fórmi-co*, apud la samradikaj pli oftaj, pli ordinaraĵoj respektivaj *hijo*, *hierro*, *horno*, *hilo*, *hormiga*; ĉar la unuaj ne estas derivaĵoj de la duaj sed prenitaĵoj rekte el la klasikaj aŭ fremdaj formoj, kiel *filatura*; en kastila lingvo *filatura* povas esti nur katalunismo, italismo aŭ francismo. Kaj pli grave: la lasta oficiala eldono de la "Diccionario de la Academia", Madrid 1948, unuafoje enhavas la eraran (pro kataluna influo) formon *hilatura*. En ĉiuj antaŭaj eldonoj de tiu "Diccionario" troviĝas nur *filatura*, kaj ankaŭ, kompreneble, la vera kastila formo *hilandería*, kiun la katalunoj ne memoris por traduko de *filatura*.

NECESA POLIGLOTISMO

Ĉu, do, kulture, pedagogie, lernado de pluraj lingvoj estas tabuo? Matematike, tempo de homo, kiu deziras esti dulingva, ne estas duobla, sed same longa, aŭ same mallonga, kiel por la unulingva aŭ deklingva. Tio signifas ke, se li volus praktiki dek lingvojn, li nur havus dekonan tempon por ĉiu. Ankaŭ homo, kiu pasigas tempon por lernado paroladi en pluraj lingvoj pri unu afero, tiun tempon deklingvulo ne havas por lernado pri pluraj aferoj en unu lingvo; por pli riĉa aŭ profunda kulturo havas tempon homo kiu rezignas poliglotion. Se Pasteur, ekzemple, estus esplorinta astrojn kaj mikrobojn, li estus haviinta

nur duonan studtempon por ĉiu afero ; se iu alprenas dek malsamajn fakojn, restas al li nur dekono da tempo, da vivo, por ĉiu fako. Memoru la latinon : « pluribus intentus, minor est ad singula sensus. »

Psikologie, se tuta identiĝo fariĝas inter pensado kaj unu lingvo, nur dekona, probable neniel, tia identiĝo eblas ĉe dek lingvulo. Kiel mi supre diris, memoro devas anstataŭi spiriton ĉe poligloto. Tamen ni celas internacian homkomprenon. Civilizita homo el iu lando devas kompreni civilizitan homon el alia lando, malgraŭ natura multlingveco en la homaro. Do poliglotismo, lernado de dua, tria, eĉ pli da lingvoj estas nepre, necesa ! Ni devas superi la kulturan aŭ pedagogian baron de poliglotismo.

MINIMUMA MALPROFITO

Normala celo de kulturo estas: plej multe aŭ plej bone scii ; plej vasta kaj riĉa sciado en unu lingvo, anstataŭ malvasta kaj supraĵa sciado en pluraj lingvoj kaj malmulta sciado plurlingva.

Same kiel vivado, enradikiĝo en diversaj landoj, sopirigas al ĉiuj loĝitaj, kontraŭ la loĝata; tiel, aktiva praktikado de pluraj lingvoj influas kontraŭ ĉiu el ili. Se vizitado de diversaj landoj ne influas kontraŭ la propra, ĉar vizitado ne sufiĉe enradikigas, ankaŭ pasiva konado de aliaj lingvoj ne influas kontraŭ la propra, ne riskigas kontraŭ la identiĝo inter la propra sentado aŭ pensado kaj la propra lingvo, ne intermiksas, konfuzigas, mortigas lingvajn spiritojn, ne babeligas.

Se mi, katalunlingvano, lernas ke mia ordinara vorto *cadira* estas katalunĝinta formo de la greka *katedro*, se mi lernas ke la latina esprimo *agnus Dei originis* la katalunan *anyell de Déu*, mi pli profunde ekscias pri mia lingvo. Sed se mi devas por certa ideo foje diri *no ho facis malbé*, foje *no lo eches a perder*, foje *don't spoil it*, foje *ne difektu ĝin*, tiam fariĝas neeble paroli spontane; mi devas atenti, memori kiel ĉiu ideo esprimiĝas laŭ vortoj kaj sintakso, laŭ stilo kaj fonetiko en ĉiu el tiuj lingvoj. Se ĉiuj tiuj estas "miaj lingvoj", mi ne plu havas propran lingvon, en kiu mi spontane povas pensi-paroli.

Se mi rigardas la spektaklon, ĝis mi komprenos la spektaklon; — se mi lernas la teatraĵon, ke iuj diras *How are you*, aliaj *Wie geht es Ihnen*, aliaj *Comment vous portez-vous* por *Kiel vi fartas*, se mi devas nur rekoni tiujn malsamlingvajn esprimojn, por ilin kompreni kiam mi ilin aŭdos aŭ legos; se mi devas nur pasive ilin scii, kaj ili ne antaŭu mian esprimon, ne sin trudu kontraŭ mia persona aŭ nacia dirmaniero, sed mi ĉiam uzas nur mian, ĉar alilingvanoj komprenas ĝin, kiel mi komprenas ĉies respektivan lingvaĵon, tio estas, se ni ĉiu komprenas unu la alian, parolante ĉiu sian lingvon pure, facile, spontane, ĉar ĝi suferis neniel pro anstataŭado aŭ trudado de alia, de alispirita, alikarakterata, alinacia, alipersona — tiam interkomprenado ne kaŭzas lingvan intermikson.

Sed homo ne povas, eĉ nur komprene, lerni tiom da lingvoj, kiom estas en la civilizita homaro. Do la pasiva poliglotismo, kvankam pli favora solvo, psikologie, pedagogie, kulture, ol la aktiva poliglotismo, ne povas esti plena, definitiva solvo. Ni devas akcepti neeviteblan domaĝon de aktiva poliglolo; kiel

ni akceptas tiom da homaj kaj homaraj neeviteblaj domaĝoj. Sed nia devo estas minimumigi ĉian malprofiton, kaj maksimumigi ĉian profiton por la homaro.* Bedaŭrinde, nuntempe, rilate al poligloto, la ĝenerala sintenado en la civilizita mondo estas plej malprofita, plej multekosta, plej malampleksa, plej malfacila: aktiva poligloto baze de naciaj lingvoj. Esperanto, dua komuna lingvo, neŭtrala, helpa, regula, logika, facila, fleksebla, senfina kiel decimala sistemo lingva kompare al naciaj sistemoj, Esperanto estas plej bona solvo: minimuma neevitebla aktiva poligloto.

INTERSOLVO

Dum ni, esperantistoj, batalas por definitiva solvo por tuthomara lingva interkomprenado, la poliglota mondo povus alpreni la intersolvon de pasiva poligloto, pli konvena ol aktiva. Ĉu?

* Delfi Dalmau, en « Proceedings of the Second International Congress of Phonetic Sciences », London, 1935.

POR PAROLIGO:

Ĉu kulturlingvoj pli multiĝis aŭ malmultiĝis en la nuna jarcento? Ĉu konscio pri naturaj rajtoj de propra lingvo vigliĝis aŭ malvigliĝis lasttempe en la tuta mondo?

Ĉu naturaj lingvoj estis ĉiuj oficiale agnoskitaj antaŭ la milito 1914-18?

Kiujn fremdajn lingvojn vi lernis? Kiujn vi komprenas lege? En kiuj vi flue parolas? Ĉu vi aŭdis fremdulojn bone paroli vian lingvon?

Ĉu vi povas fuŝi fremdan lingvon, se vi rezignas ĝian aktivan uzon? Ĉu poligloto estas nuntempe amplekse necesa?

Kion diras Enciklopedio aŭ faka verko pri morto de latina lingvo? Kio malsanigas lingvon aŭ baras ĝian disvolviĝon?

Kiun anekdoton vi memoras pri malbona tradukaĵo aŭ maltrafa uzo de nacia lingvo? Kiom da lingvoj ekzistas en Belgio, en Sovetunio, en Iberio, en via lando?

Ĉu vi scias kiel sonas la katalunlingva nomo Puig, la hispanlingva Pérez, la portugallingva Pinheiro?

Kion vi opinas pri aktiva kaj pri pasiva poliglotoj? Kian kapablon aŭ malkapablon vi rimarkis ĉe viaj instruistoj pri fremdaj lingvoj?

Ĉu vi mem iam lernigis vian lingvon al fremdulo? Ĉu vi iam legis leterojn de fremduloj en via lingvo?

LINGVISTIKO KAJ ESPERANTUJO

En la lingvistika kaj interlingvistika kampoj, mi dankas Manders kaj ĉiujn esplorintojn pri lingvoj kaj interlingvoj. Mi memoras ke mi multe ĝuis legante siatempe esperantajn pristudojn de de Saussure kaj Stojan, kiel nun de Manders. La kleraj katalunaj modernaj gramatikistoj, unue Fabra kaj poste Moll, Coromines, Sanchis Guarner, havigis al mi lumigajn plezurojn kaj plezurajn lumigojn. Same povas mi diri rilate al Benot pri kastila lingvo, Jespersen pri angla kaj ambaŭ pri ĝenerala profunda gramatiko. Mi ne citu multajn aliajn, kiuj utilis aŭ plaĉis al mi, pri diversaj lingvoj, sed ne tiel profunde min impresis. Nu, en la kampo de la simpla esprimado, de la lingvuzado, de la homa interrilatado, mi ĉion ŝuldas al la grandaj *kreintoj* de mia lingvo kaj de la aliaj kiujn mi lernis, per kiuj mi povis legi ne nur la respektivajn literaturaĵojn, sed ankaŭ la respektivajn pristudojn. Tiel sen Esperanto, sen Zamenhof, mi ne povus danki al niaj de Saussure, Stojan kaj Manders inter aliaj, mi ne povus ĝui Esperantujon kun tiom da verkistoj, kun tiom da *gesamideanoj* en ĉiuj landoj.

Oni povas senfine paroli pri detaloj — ĉu pli bone nacio aŭ nacio, finaĵo por pluralo per *j*, *s*, aŭ *n*? — Inter la angla *nation* elparolata per du simplaj silaboj ĉiu kun unu simpla vokalsono kaj akcento sur *a*, kaj la itala *nazione* kun kvar vokalsonoj kaj akcento sur *o*, estas multaj vidpunktoj, preferoj, opiniebloj; tiom, ke neniam finiĝus la diskutado. Por universala lingvo, planlingvo, interlingvo, mil, centmil tiaj detaloj estas diskuteblaj; kaj fine ĉiuj devus lingve harmonii inter si, aŭ pristudo rekomenciĝi. Kaj certe oni devus rekomenci senfine. Feliĉe, Zamenhof estis pli ol genia lingvisto aŭ interlingvisto: genia lingvulo inter Okcidento kaj Oriento; tial li kreis lingvon por internacio, kiel ĉiuj Dante'j konscie-nekonscie faris por nacio.

Nur dank' al sinteziga genieco, kaj mirakla momento por naskiĝo de lingvo, de solvo sopirita de homaro dum jarcentoj, dum jarmilioj, Zamenhof povis krei Esperanton. Senfinaj estis la problemoj, eĉ post vido, decido aŭ intuicio, ke internacia lingvo devas esti natura lingvo: kiel, ekz., diri internacie la katalunan *portar*, kastilan *llevar*, francan *porter*, italan *portare*, portugalan *levar*, anglan *carry*, germanan *tragen* inter tiom da aliaj naciaj diferencoj? Ĉu *tragi, kari, porti, ...?* *Porti* estas ne akceptbla, ĉar la radiko *port* estas internacia kun senco: libera spaco aranĝita en muro: angla vortaro diras: *porter: door-keeper, gate-keeper*; en germana vi trovas *Portal, Portier, Portiere*; en kataluna, portugala kaj itala pordo estas *porta*; en hispana, pordisto estas *portero*. Krome, *port* estas ankaŭ internacia por ŝiprifruĝejo: en angla *port*, franca *port*, itala *porto*, portugala *pôrto*, hispana *puerto*, kataluna *port*:

do internacia *portisto*, ekzemple, signifus laboristo por siprifu-
ĝejoj, kaj por enirejo-elirejo ĉe muro, domo, palaco. Neeble,
do, akcepti la radikon *port-* por senco subteni pezan objekton.
Aliflanke, la angla *carry*, la hispana *carro* kaj eĉ la kataluna
carrer, havigas radikon *kar-* por tiu signifo. Tamen, Zamenhof
solvis plej trafe per *porti*, *pordo* kaj *haveno*. Efektive, plej
internacia estas *import*, *eksport*; eblis palatumi *t* al *d* por
pordo kaj alpreni la anglan-saksan *haven* el la landoj kie
estas plej grandaj kaj multaj havenoj el kiuj ŝipoj iras al plej
diversaj landoj. Tiel la Majstro solvis kiel genia lingvulo,
milojn da problemoj, kiujn lingvistoj kaj lingvistikistoj inter-
diskutus senfine, pri antikvaj vortoj. Kaj pri modernaj? Ne
ĉiuj modernaj estas tiel simplaj kiel *telefono* aŭ *kafo*. Estas la
internaciaj *cigar* kaj *cigarette*; sed *cigareto* estus malgranda
cigaro. Do, kiel diri *cigarette*, kiu signifas alian aferon? Tre
facile estas post solvo kiel *portisto* kaj *pordisto*, *cigareto* kaj
cigaredo!

Jes, tre facile kiam iu trafis la solvon. Tre simple, sed
neniu elpensis ĝin antaŭe!

Post la homara, la universala genia solvo de Zamenhof, en
Esperanto, kiel en ĉiuj naturaj lingvoj, aperados pli-malpli
gravaj solvendaĵoj. Post la fundamenta solvo kaj solva funda-
mento de la Majstro, lingvistoj, lingvistikistoj kaj interlingvisti-
kistoj multe devos diskuti pri relative flankaj problemoj. Ni
memoru kiel ortografie modernigis kelkaj lingvoj: rusa, turka,
portugala, kataluna; kiel priokupiĝas anglalingvaj eminentuloj
pri tiu afero.

En angla lingvo ne nur estas iuj paroj aŭ paraleloj kiel *tongue* kaj *language*, sed preskaŭ duobla lingvo: saksa-angla kaj latina-angla. Facile estas klarigi ke *tongue* estas *lango* kaj *language*, *lingvo*; plej moderna angla vortaro, post senco de *lango* aldonas kiel sencoj de *tongue*: *power of speech*, *manner of speaking*, *speech*, *language*; do *tongue* signifas ankaŭ *lingvo*. Estas libroj kiuj montras ke paĝoj da teksto povas esti esprimataj tute en *lingvo* de *tongue* aŭ tute en *lingvo* de *language*. Tamen la angla funkcias evidente kiel nacia kaj kiel internacia *lingvo*.

Alia nacia kaj internacia *lingvo* estas la kastila. Tamen, en ĝi konkuras aŭ rivalas por restoracio la formoj: *restaurán*, *restaurant*, *restaurante*, *restorán*; por fadenfabriko: *filatura*, *hilatura*, *hilandería*; por piedpilko: *foot-ball*, *futbol*, *fútbol*, *balompié*. Se iu konsultas en hispana vortaro uzon de plej oftaj prepozicioj, tiu falas en labirinton.

Cetere en ĉiuj naturaj kulturlingvoj okazas simile. Kaj tamen ĉiuj progresas, difiniĝas, preciziĝas!

Esperanto estas natura *lingvo* kaj evoluas idente al ĉiuj naturaj, sed fundamente de internacia hindoeŭropa bazo, anstataŭ nur nacia; kaj el kerno de fundamentaj simplaj gramatiko kaj vortaro.

Zamenhof mem antaŭvidis tian evoluon kaj malfermis al ĝi ĉiujn pordojn. Li ĝojus vidi hodiaŭ plenan gramatikon kaj plenan vortaron, kaj konstati jam klasikan kaj modernan *lingvajon*.

Ni ĝoju ke estas jam lingvistikistoj en Esperantujo; sed ni pli profunde ĝoju ke estis en nia mondo Zamenhof, kaj ke dank' al li kreiĝis Esperantujo laŭ *lingvo* kaj laŭ sento internaciaj.

Ne estas katastrofo ke diversaj formoj rivalas por esprimi saman sence, ĉu en nacia, ĉu en internacia lingvo. Sed ni devas elekti el plej bonaj verkistoj kaj oratoroj, por triumfigi la plej trafan. Gramatikistoj kaj vortaristoj devas aposteriore konfirmi nian pli ĝeneralan elekton.

POR PAROLIGO:

Ĉu vi aŭtomate kaj spontane parolas vian lingvon? Ĉu vi same flue kaj facile parolas alian nacian lingvon?

Ĉu en via lingvo estas multaj barbarismoj? Ĉu ili bone aŭ malbone efikas al ĝi? Kial aŭ kiel ili envenis?

Ĉu vi preferas multe scii en malmultaj lingvoj aŭ malmulte en multaj?

Ĉu homo kiu volas moderne vivi bezonas pli ol unu lingvon? Kiun solvon vi proponas?

Kiel oni povas limigi al minimumo la psikologian perturbon de neevitebla poligloto?

Ĉu pasiva poligloto povas esti plena solvo por tut-homara interkompreno?

Kiuj lingvoj estas ordinare postulataj al poligloto en via lando? Ĉu la samaj kiel antaŭ 50 jaroj?

Kiu scienco originis el Esperanto? Ĉu vi legis pri Esperantologio de Paul Neergaard, Vilho Setälä, G. Waringhien?

Ĉu vi legis pri Esperantologio de Olav Reieral, R. C. Marble, Régulo Pérez?

Ĉu vi legis pri Esperantologio de W. E. Collinson, N. Kasasaki, F. I. Wiener?

Ĉu vi legis pri Esperantologio de Leo Blaas, Cecil Bean, Marek Wajsblum?

Ĉu vi legis pri Esperantologio de Björn Collinder, Kalocsay, S. la Colla?

Ĉu vi legis pri Esperantologio de Edmond Privat, G. John Ramstedt, Eugen Wüster?

Ĉu vi scias kiu estas la Prezidanto de la Akademio de Esperanto? Kiuj, la Prezidintoj?

Kiel oni povas kompari Zamenhof kaj Dante?

DOKTRINO KAJ LINGVO

Eble se Zamenhof estus naskiĝinta kaj edukiginta en Moskovo, Oksfordo, Madrido aŭ Lyon, lia genio estus kreinta aferon tute alian ol neŭtralan internacian lingvon. Tial mi opinas ruslingvanon, anglalingvanon, hispanlingvanon aŭ francilingvanon esperantistan ja pli merita ol min: katalunlingvanon. Eĉ nacie, mia lingvo suferas, kiel la pola tiam, kiam Zamenhof inspiriĝis por Esperanto. Tial ankaŭ mi laŭdemas precipe esperantismon de nacioj, kies lingvo estas plene mastra aŭ iel internacia; kaj mi miras, ke finnoj, svedoj, japanoj aŭ katalunoj dubemas pri neŭtrala internacia lingvo. Esperantismo de rusoj kaj angloj, kastiloj kaj ĉinoj estas pli malegoista, pli nobla, ol esperantismo de nacioj, kies lingvo estas malavantaĝa en la internacia kunvivado.

Tamen, spirito kaj spertoj, psikologio kaj cirkonstancoj de ĉiu homo komprenigas, sentigas doktrinon malsame — ĉu internan ideon de Esperanto, ĉu iun difinitan religion aŭ politikon. Tial Oliver Brown iam asertis: « Mi forte bedaŭras la tagon kiam mi kompromitis la unuecon de mia partio per enlaso de la dua membro », el « Esperanto en Skotlando », Septembro 1954.

Malgraŭ ke oni komence lernas ion imitante, eĉ nur rigardante, aŭskultante, ĉiu vidas, aŭdas agas malsame. Kaj ju pli iu personeco estas forta, originala, des pli ĝi personecigas sian dialekton kaj sian dialektikon. Tiu fakto, plej elementa postulo de la naturo, devigas nin al toleremo, al komprenemo. Ne ekzistas, neniam ekzistis aŭ ekzistos, eĉ du samspecaj arboj egalaj, eĉ ne du egalaj beroj. Kaj homoj estas multe pli riĉaj, malsimplaj, ol vegetaĵoj. Tial vole-nevole ĉiu havas sian dialekton en sama aŭ komuna lingvo, kaj sian dialektikon pri komuna aŭ sama doktrino; sed feliĉe, ĝenerale restas la pli bonaj pensoj, sentoj, esprimoj. Tiel progresas la lingvoj, filozofio, sciencoj. Ekzemple: pri la ideo, ke oni ordinare ignoras siajn erarojn, kulpojn, malvirtojn, kaj tre facile juĝas malfavore kunhomojn, ĉiu lingvo havas trafajn kaj belajn esprimojn malgraŭ ke senfine da samlingvanoj maltraste, malbele aŭ malĝuste esprimas tiun ideon. Katalune, estas la frazo *cap geperut no es veu el gep* (neniu ĝibulo vidas sian ĝibon), kiu plej koncize kaj elokvente, plej fidele al spirito de la kataluna lingvo esprimas la penson; tial ĝi restis, disvastiĝis, ĝeneraliĝis anstataŭ miloj da aliaj malpli bonaj samcelaj diraĵoj. Tiel okazas en ĉiuj lingvoj, kaj tiel ili ĉiuj riĉiĝas, fortiĝas, atingas aregon ne nur da vortoj, sed da frazoj — pli kompletaj esprimiloj.

Facile estas konstati kiel la lernintoj de sama manskribo, precipe kiam ili jam mastras ĝin, jam aŭtomate ĝin uzas, ĉiu prezentas sian personan manskribon, sian manskriban dialekton. Same aperas, ankoraŭ pli radikale, pri stenografio. Kaj eĉ plej bonaj aŭtoroj de stenografiaj sistemoj neniam finas ilin

perfektigi. Pri ĉia verko tiel okazas. En ĉiuj naciaj lingvoj estas ĉiam krizoj kaj problemoj leksikaj kaj gramatikaj. Esperanto, homara lingvo, kaj plie, internacia lingvo, devos progresi kun tiaj, malgraŭ tiaj, krizoj, problemoj.

F. Faulhaber, en « La Progresanto » (15 Aŭg. '54) prezentis komparon de sama teksto pola, esperantigita de niaj verkistoj Kabe kaj Grabowski. Kaj li devis konstati ke « la du tradukoj okulfrape diferencas inter si, ne nur per vortelektio kaj frazkonstruo, sed precipe per la maniero de tradukado; Grabowski klopodis traduki la rakonton kiel eble plej fidele, redonante eĉ la plej etajn detalojn. Kabe, kontraŭe, fortranĉis ĉion ne nepre necesan. Li tradukis « flulinie » kaj oferis la precizon al la stilo ». Jen, do, kiel, eĉ bremse pro tradukado, ĉiu verkisto diferencas en sama lingvo per vortelektio, frazkonstruo kaj alie. Tio estas: ĉiu tradukas per sia persona Esperanto, per sia Esperanta dialekto. La kastila lingvo de Cervantes (XVI jarcento), la cervantesa dialekto, ekzemple, estas pli riĉa ol la kastila lingvo de Benavente (XX jarcento) kaj tamen, la kataluna lingvo de Josep Carner (XX jarcento), la Carnera dialekto, estas pli riĉa ol la kataluna de Auziàs March (XV), ambaŭ eminentaj poetoj. La personeco de ĉiu, la literatura personeco, se oni volas precizigi, estas kaŭzo de tiaj diferencoj.

Per ĉies bonaj dialektikoj la homara kulturo progresas, kaj per ĉies bonaj dialektoj, ĉiu lingvo ampleksiĝas kaj perfektiĝas.

Ekzemple, se mi uzis la esprimon: *neniu ĝibulo vidas sian ĝibon*, kaj Zamenhof: *propran ĝibon neniu vidas*, ĉiuj legantoj preferas la Zamenhofan, kaj ĉi tiu venkos. Tiel okazas por

ĉiuj lingveroj en ĉiu lingvo. Ne ekzistas absolute pura lingvo, — absolute pura aĉro — sed dialektaro ĉiam flukuanta.

Tial ĉiu Esperantisto povas prezenti nur sian Esperantan kapablon pri la lingvo kaj la interna ideo, kaj ni devas rezigni malutilajn diskutojn pri personaj kaj personecaj diferencoj, kiuj eĉ aperas aŭ malaperas pro persona evoluo. Kaj tio ja ne signifas ke ĉiu devas rezigni eldiri sian senton aŭ penson, sian opinion, sed ke oni bonvolu kompreni pri siaj limoj, pri ĉies limoj, eĉ celante pliboniĝon!

La lingva naturo respegulas homan, homaran naturon. Ĉu dubeble?

Ke *stano* estas substantivo, kaj $2 + 2 = 4$, estas simplaĵoj pri kiuj neniu volas diskuti. Sed, lingvoj kaj sciencoj atingis pli subtilajn punktojn. La Fundamento de Esperanto kernas tuthomaran lingvon ne nur kiel ia kodo, sed kiel lingvo! La 16 reguloj estas sintezo, sed ne la plena tezo — senfina tezo de plena internacia lingvo.

Pura Esperanto ne ekzistas, kiel ne ekzistas pura germana lingvo — ĉi-tiun konsistigas senfina germana dialektaro, kiel Esperanton senfina Esperanta dialektaro.

« Urtiko » en « Heroldo de Esperanto », Aprilo 1952, sub titolo « 16 reguloj sen esceptoj » publikigis:

« Jes, nun mi legis kaj aŭdis ĝin tiel ofte ke preskaŭ mi komencis kredi ĝin. Mi diras « preskaŭ » kaj « komencis » (imperfekto), ĉar intertempe mia kredo denove ŝanceliĝis.

Imagu: Mi skribis leteron al samideano, kiun mi opiniis prudenta kaj saĝa. Li resendis al mi mian leteron kun multaj « korektoj ». Ekzemple: mi uzis infinitivon post « sen »; mi skribis

dufoje simplan «dum», sed li «korektis» ĝin unufoje je «dum ke» kaj alian fojon je «dum kiam» (kio por mia orelo sonas kiel kakofonio); mi skribis «granda kiel elefanto», kaj li ŝanĝis ĝin je «granda kia (!) elefanto» (mi demandas min, kie ekzistas tiu tia-elefanto); mi skribis pri «Universala Kongreso en Bavario» — li faris el ĝi «Bavarujo». Mi uzis malnovan neologismon (ĉu io tia ekzistas?) «kalva» por «senhara». Mi uzis post «po», konsiderante ĝin prepozicio, la nominativon, kaj li asertis ke oni povas ĝin rigardi nur kiel konjunkcion, kaj tial mi devis uzi post ĝi akuzativon.

Mi estas sincere konvinkita, ke ĉiuj miaj formoj estas korektaj, certe ne malpli korektaj ol liaj «korektoj». Sed eĉ se liaj formoj estus pli korektaj ol miaj, — kial la harfenduloj ne volas lasi al ni ceteraj iom da libereco? Ĉu vere oni opinias, ke estas tre grave, ĉu iu uzas infinitivon post «sen», ĉu oni preferas por iuj landoj la formon kun -io, kaj por aliaj la formon kun -ujo, ĉu iu foje uzas «neologismon» jam uzitan antaŭ dudek jaroj aŭ eĉ jam de Zamenhof, se ĝi ŝajnas al li taŭga kaj praktika?

16 reguloj sen escepto! Ha, se tio estus la pura vero, Esperanto jam estus venkinta.»

Jen kion diris «Urtiko». Mi simple respondus male: se la 16 reguloj de Esperanto estus matematikaj, absolute senesceptaj, Esperanto neniam venkus, ĝi ne estus lingva lingvo!

En Esperanto kiel en ĉiuj homaraj lingvoj iuj verkas aŭ paroladas pli klare, korekte, elokvente, aŭ fuŝe, ol aliaj. Ne ekzistus esperantistaj oratoroj kaj poetoj se la Zamenhofa lingvo estus pli «logika», ol la homa, ol la homara spirito. Se

post la vortaro kaj la gramatiko, Zamenhof ne povus viviĝi la vortojn kaj la regulojn per frazoj, paragrafoj, verkoj, paroladoj, se aliaj verkistoj kaj oratoroj ne vivigis Esperanton ...

Vortaristoj kaj gramatikistoj ne povas elpensi vortojn kaj regulojn, neologismojn kaj esceptojn, frazojn kaj idiotismojn. Ili devas nur registri la sankciitajn pro uziteco en plej bonaj verkoj. Eĉ Zamenhof unue sentis la lingvon. Li estis pli poeto ol filologo. Same okazas pri muziko, pentrado. La teoriistoj verkas analizojn de la artaĵoj. Unue estis la lingvoj, la parolantoj, la verkantoj; nur poste la vortaristoj kaj gramatikistoj; kaj post ĉi-tiuj la filologoj. Eminentaj akademianoj de la hispana lingvo elpensis *balompié* kontraŭ la anglismo *fútbol*; ili trompiĝis, kaj devis tion agnoski post provado dum jaroj: la popolo *fútbol* venkis la filologian *balompié*.

Mi ja ne deziras glatigi la fuŝadon de senkonsciuloj, kiuj rapide aŭ facile volas atingi rangon de verkistoj aŭ oratoroj. Mi nur atestas, konfesas, kiel mi vidas aŭ komprenas la lingvan naturon, vojon, ordon. Mi certe devas konstati specialan danĝeron por Esperanto, se ni eĉ momenton forgesas ke nia lingvo estas tutmonde internacia; ni devas klopodi ĉiam eviti nacilingvan influon, tio estas, speciale nacian, kiam ni esprimiĝas Esperante. Sed la ĝenerala nacilingveco estas komuna al ĉiuj lingvoj, ĝi estas la tuthomara lingva sento. Ĉar, funde, ĉiuj naciaj lingvoj fontas el homo, homaro, homeca spirito. Sub ĉiu nacia lingvo estas esence la komuna tuthomara lingvo. La supraĵaj naciaj diferencoj postulas la Esperantan reguligon por komprenebla interlingvo, sed tia reguligo ne povas atingi absolutecon, se ĝi devas esti lingva reguligo. Tamen, ni devas

celi perfektan reguligon, sed kun homama komprenemo. Ni devas konscii ke esperantisto, eĉ plej alta, nur home, nur relative, povas. Zamenhof ekzemplis al ni pri komprenemo. Ni legu kaj relegu liajn leterojn.

POR PAROLIGO :

Ĉu facile estis trafi internacian radikon por ordinaraj vortoj?
Ĉu vi konas por iu senco plurajn malsamlingvajn vortojn ?

Ĉu iam finiĝas solvendajoj en lingvo ? Ĉu en via nacia lingvo ĉiu senco havas difinitan esprimon ?

Ĉu en via lingvo estas malsama radiko por *placi* kaj *sati*, por *necesa* kaj *bezoni* ?

Ĉu en via lingvo estas paroj, kiel la Esperantaj *ĝenerale-generalo*, *portisto-portisto*, *cigaredo-cigareto*, *lingvo-lingvo* ?

Ĉu vi konscias spiriton en via nacia lingvo ? Ĉu vi konscias spiriton en Esperanto ?

Ĉu vi opinias ke Zamenhof estus genio se li ne kreus Esperanton ?

Ĉu vi povas absolute konsenti laŭ dialekto kaj laŭ dialektiko ĉion, kion vi legis de la aŭtoro pri tiu temo ?

Ĉu estas en via lingvo belaj kaj malbelaj esprimoj, dirmanieroj, parolturnoj? Ĉu viaj samlingvanoj ĉiuj parolas agrable al via aŭdo kaj al via penso aŭ sento ?

Kiaj esprimoj havas plian vivon, belaj aŭ malbelaj? Kiujn pensojn vi pli facile retenas, klarajn aŭ konfuzajn ?

Ĉu Kabe kaj Grabowski tradukis saman polan tekston al Esperanto per samaj vortoj kaj frazoj de la Zamenhofa lingvo ? Kial ne ?

Ĉu vi konas la fakan dialekton pri teologio en via lingvo ? Ĉu vi konas la fakan dialekton pri muziko en Esperanto ?

Ĉu lingvo statikas aŭ fluktuas ? Ĉu vi bone komprenas tekston en via lingvo skribitan antaŭ ses jarcentoj ?

Ĉu vi ĉiam facile distingas esprimon, ĉu ĝi estas prepozicia, konjuncia aŭ adverba ?

Ĉu malsamaj esprimoj por certa senco povas esti korektaj ?

Ĉu lingvo vivas se ĝi ne estas uzata ? Kia lingvo pli multe riskas, se ĝi estas senzorge uzata, nacia aŭ internacia ? Kial ?

DANĜERO KAJ LINGVISTIKA LEĜO

Troa senskrupuleco enkonduki vortojn — ĉu malbone kunmetitajn per Esperantaj oficialaj aŭ fundamentaj elementoj, ĉu neologismojn — malpurigus kaj balastigus nian lingvon. Krom « mallarĝa », en la skotlanda gazeto « Esperanto » n.º 25, mi legis « streta » kaj « strikta ». Germanlingvano eble bezonus ankaŭ « ŝmala ». Kaj ruso, ĉino, hungaro, aliajn *sinonimojn*. Tio certe ne akordiĝas kun la saĝa Bulonja Deklaracio : « Ĉiun ideon, kiu ne povas estis oportune esprimita per materialo, kiu troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », ĉiu Esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed por plena unueco de la lingvo, al ĉiu Esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton. »

Ni vidas kiel per la eldiro « ĉiu Esperantisto havas la rajton esprimi en *tia maniero*, kiun li trovas la plej ĝusta » estas malfermita la pordo al ĉiuj neevitablaj personaj kaj fakaj dialektoj.

Sed internacia lingvo estas pli endanĝerigebla ol nacia, pro tio ke centoj da naciismoj por ĉiu ideo estas Esperantigeblaj! Tial Esperantistoj devas esti singardemaj kontraŭ naciismoj ĉu en sintakso ĉu en vortoj simplaj aŭ kunmetitaj! Kant, Göthe kaj Nietzsche, ĉiu verkis en persona germana dialekto, ĉiu verkis en propra persona maniero germanlingva; sed tia fakto estas fonto por riĉigi kaj fleksebligi ilian komunan lingvon. Lingvo estas nur senfina dialektaro, harmonia interdialektaro, interdialektado. Pura lingvo, statika kaj absoluta lingvo, ne ekzistas. Lingvo estas reflektado de homaro, de homara pensado kaj sentado, de spirito.

En niaj okcidentaj lingvoj konstateblas duobliĝoj kiel *pensar - pesar, causa - cosa*, t. e. : pli klasika kaj pli vulgara aŭ evoluinta formoj por du nuancoj aŭ ideoj, riĉiĝo leksika por semantika riĉiĝo, precizigaj formoj por diversaj signifoj. Foje, eĉ por sama ideo duas esprimeblo vortara. Plenaj paĝoj da angla teksto povas prezentiĝi en saksdevena kaj en latindevena anglaj. En kataluna estas *entremig* kaj *intermedi*, *embrutar - embrutir, ximple - simple, sencer - sincer, medicina - medicina*, k. t. p. por pli ordinara kaj por pli intelekta sencoj. Ekzemple: *medicina* por *rimedo* kaj *medicina* por *medicino*, *sencer* por *kompleta* kaj *sincer* por *sincera*. Krome, estas grekdevena *metamorfosi* apud latinida *transformació*, kiel *poliglót* kaj *plurilingüe*, *amoré* kaj *disforme*, *policrom* kaj *multicolor* inter aliaj. Ĉu Esperanto povos eviti tian multobliĝon? Imagu ke okcidenta teologo por teknikismoj enkondukas la vortojn *omnipotencia, omniscia* k. t. p. Kiel tio impresos al orientaj samideanoj? Certe, slavoj kaj araboj, ĉinoj kaj

japanoj, alprenis la okcidentan kemion, medicinon, astronomion; kaj Esperanto precipe utilas por kulturitaj homoj el ĉiuj landoj kaj lingvoj. Tamen, ni kontraŭstras la pure okcidentajn provojn de interlingvo aŭ internacia lingvo; sed ĉinoj kaj hindoj, koreanoj kaj indonezianoj devus pli multe kontribui al Esperanto.

Ni bone konstatas ke la Esperantaj manieroj aŭ personaj dialektoj de sviso Privat, hungaro Baghy, jugoslavo Lapenna, skandinavo Engholm k. c., tute konvenas, harmonias en komuna Esperanto. Orientanoj ankaŭ pruvis al ni, ke ili konsentas kaj akordiĝas en nia internacia lingvo. Sed ni dezirus, ke ili ankaŭ kapablu sukcesigi en Azio Universalajn Kongresojn, ke la aziaj samideanoj organizu internaciajn asociojn kiel S. A. T., publikigu ĵurnalojn kiel «Heroldo». En Azio ja estas homaro multnombra, kiu bezonas internacian lingvon.

Ni devas ĉiuj kunfratece klopodi por plej baldaŭ atingi nian celon en gloro por la tutmonda homaro.

POR PAROLIGO:

Ĉu danĝero por Esperanto ekzistas nur pro troa enveno de neologismoj? Ĉu ni ankaŭ devas singardemi kontraŭ malbone kunmetitaj vortoj?

Kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto? Kiu la plej bone konas ĝian spiriton?

Ĉu iu povas profunde koni lingvon antaŭ longa kaj persista uzado je ĝi? Ĉu vi kuraĝas opinii pri io grava, kion vi ne profunde konas?

Ĉu vi konas la etimologion de *pensi* kaj *pezi*, de *metamorfozi* kaj *transformi*?

Ĉu azianoj jam organizis Universalan Kongreson de Esperanto en sia Kontinento?

Ĉu ekzistaj multaj jurnalaj esperantistaj en Azio?

Kiu leĝo estas preferinda, iu konvena al ĉiuj popoloj aŭ iu konvena al nur kelkaj?

Ĉu vi povas eviti subjektivecon, kiam vi celas justecon?

Kiu rezonado estas pli varma: senta aŭ pensa?

Ĉu pensado sufiĉas al homaro?

Ĉu homa ekvilibro, ĉu homara ekvilibro, estas facila?

Ĉu vi kapblas ĉiam ekvilibre, harmonia, agadi cele al ĉiuj, ĉe kiuj estas vi mem?

Kion vi opinias pri troa altruismo?

JUSTECO

PENSO KAJ SENTO

Laŭ leĝoj? Jes, sed laŭ universalaj, tuthomaraj leĝoj. Ne laŭ oficialaj, imperiaj postuloj, superregoj. Universala justeco, kies ĉefa malamiko aŭ danĝero estas imperio laŭ politika starpunkto.

Per komprenigo, por justa kaj paca interrilatado de homoj kaj popoloj, oni intencas eviti sentadon super pensado. Jes, se estus eble, ke la malvarma rezonado estu pli forta ol la varma. Sed por homaraj, ĝeneralaj movadoj sentado, koro, fido, t. e. varma konvinko, estas necesa, kaj eĉ neevitebla. La animo de Zamenhof, de ĉiuj genioj, povas pli multe efiki en la homaro, ol la pure spekulativa agado. Komuna estas de genio kaj popolo — homaro — la forto, la efiko de la animo. Sed oni devas amigi justecon, universalan komunan justecon, kontraŭ egoista; ĝeneralan, komunan, kontraŭ partiema.

Nura pensado malmulte efikas, ĝis kiam ĝi animiĝis. Homo kaj homaro agadas pli laŭ sentado ol laŭ pensado. Pensado okazigas movadon nur tiam, kiam ĝi etendiĝis en la animon.

KULTURO

Eĉ kulturo malamikigis homojn, popolojn. Ĉar fortuloj volis kredi, ke ilia kulturo estas la vera kulturo, la trudinda, la supera, la sola, kiu meritas tiun nomon. Certe tiu trompiĝo estas malfacila, preskaŭ ne ebla ĉe svisoj, belgoj kaj aliaj malgrandaj popoloj. Sed romanoj, araboj, hispanoj, francoj, germanoj, angloj, rusoj k. a. povis trompiĝi aŭ blindiĝi, ebriiĝi pro sia grandeco, forteco kaj kredi pri propra supereco, unikeco.

La kataluna verkisto *Carles Soldevila* antaŭ ne longe komentis tiun fakton. Li asertis, ke kompreneble oni ne povas pretendi, ke okcidentano rezignu pri sia kulturo pro respekto al orienta. Sed ke danĝere estas, ke okcidentano, kiu naskiĝis en Eŭropo aŭ en Ameriko, pretendas, ke Okcidento havas mision trudi al la cetera mondo siajn principojn, sentojn, ideojn.

MEZO KAJ EKSTREMOJ

Kiam temas pri internacia, pri helpa universala lingvo, okazas tro ofte simile: okcidentanoj volas kredi, ke ia simpligita latina, angla, hispana aŭ alia pure okcidenta lingvo estas akceptenda. Eĉ oni kuragiĝis proponi, ke la tuta mondo akceptu la hispanan, italan aŭ anglan sen simpligo. Fakte, simpligo de iu el tiuj lingvoj estus nur ia trompa eniro en la ordinaran, ĉar la naturuloj ja ne uzus la simpligon, kaj tiel ili nerekte devigus la aliajn, lerni la ordinaran post la simpligita.

Tial, nur solvo kiel Esperanto, el mezo de hindo-eŭropa lingvaro, de Kanado ĝis Aŭstralio, profunde simpla kaj riĉa

lingvo, kiu estas nenies, povas esti ĉies. Zamenhof mem ekzemplegis pri tia nenieseco-ĉieseco!

Sed eĉ tiukaze, se ne estus genia kreinto de tia lingvo, genio por tia kreaĵo, la solvo estus *malvarma*, sensenta, senkora. Kaj la homaro ne akceptus senspiritan lingvon, ĉar tia lingvo ne estus *natura*, ĉar ĉiuj naturaj lingvoj havas homaran spiriton.

Se Zamenhof ne estus kapabla por la sentoformo «Sur neŭtrala lingva fundamento — Komprenante unu la alian — La popoloj faros en konsento — Unu grandan rondon frmilian», lia solvo estus unu el tiom da provoj de eminentuloj, kiuj kreis lingvon senspiritan. Aŭ se li havus spiriton, sed ne kapablon krei formon, li ne kreus lingvon.

En la lastaj jaroj venis al mi kelkaj proponoj pri alprenado de ordinara aŭ simpligitaj okcidentaj lingvoj por universala komprenilo. Post ekzameno kaj pripensado mi devis konkludi laŭ la supre dirita, malgraŭ mia okcidenta facileco por tiaj kompreniloj. Kontraŭ justeco oni ne povas esperi pacon kaj interkompreniĝon, daŭran kaj universalan.

POR PAROLIGO:

Ĉu vi difine diferencigas spiriton, animon, personecon kaj karakteron?

Kio vin agigas pli fervore, pensado aŭ sentado?

Ĉu vi agas laŭ via kulturo, laŭ via religio aŭ laŭ via temperamento?

Ĉu vi identigas religion kaj amon? Ĉu vi identigas liberon kaj religion?

Ĉu troa forto ĉe individuo kaj ĉe popolo povas ebrigi?

Se vi trinkas unu glason da vino, kio estas trinkata? Se vi trinkas multajn glasojn, kiu estas trinkata? Laŭ japana proverbo, en la dua kazo la vino trinkas la trinkanton. Kion vi opinias, kion vi spertis?

Ĉu malgranda stato kiel Andorro aŭ Monako povas endanĝerigi liberon de aliaj popoloj? Kiaj statoj estas danĝeraj? Kiusence estas vino kaj popolforto kompareblaj?

Kiun komenton faris Karlo Soldevila pri okcidentano rilate al propra kulturo kaj al oriento? Ĉu supera kulturo rajtigas perforton? Ĉu supera forto rajtigas superregon?

Ĉu okcidenta lingvo estas trudenda al ĉiuj popoloj? Ĉu estas iu okcidenta lingvo pli perfekta al ĉiuj aliaj okcidentaj?

Ĉu «simpligita» nacia lingvo estas justa solvo por internacia lingvo?

KONSTANTE FRAPANTE

ESPEREMO

Unu el la geniaj trafoj Zamenhofaj, ĉu logika aŭ magia, ĉu-konscia aŭ intuicia, ĉu homa aŭ anĝela: la nomo de la lingvo internacia: Esperanto.—Senfinan esperon bezonas la esperantistoj, ĉiuj pacaj batalantoj por homara plibonigo, des pli mal-facila se la plibonigo estas profunda, spirita.

Multaj gesamideanoj, eĉ eminentaj lingve, gramatike, organize—science aŭ arte eminentaj—se ili ne estis pri Esperanto senfine esperemaj, ili laciĝis, malvarmiĝis, velkis. Ili estis iel eminentaj, sed ne tiel ke ili ne trompiĝis pri nia afero. Se ili trompiĝis, almenaŭ ili devis tion kompreni, kaj eltenadi: senfine da semoj perdiĝas, ni semu kaj semu konstante. Se ĉiuj, kiuj se niluziĝis ne estus perditaj por Esperanto, nia movado estus nun jam tre potenca, kaj, pro potenco, influa, altira. Ankaŭ foito konvinkas homaron, ne nur logiko, argumentado.

Ni memoras eminentulojn de Esperantujo, kiuj malbone ek-zemplis pro sia esperfiniĝo, aŭ pro tio ke ili ne trovis en nia movado sufiĉe da profito ia aŭ alia! Eble ili malesperis, eĉ dri la profito, mallonge antaŭ ĝia alveno. Ili estis ĝeneraloj kriuj

laciĝis, forlasis bataladon foje ĵus antaŭ venko. Kaj tiel ili malutilis al si kaj al sia idealo, al la popolo kiu fidis ilin, ilian kuraĝon kaj scion. Tiuj iam eminentaj samideanoj malfidelis. Ili ne estis sufiĉe sentemaj al la interna ideo, al la spirito de Esperanto, al la profunda kaŭzo ke nia lingvo longe vivas, dum tiom da imitaĵoj kaj «plibonigoj» malsukcesas. Tiuj pioniroj timis aĝadi senprofite, ridindiĝi en sia familio aŭ socio, aperante stranguloj laborantaj por idealo **verda!** Normaluloj laboradas por normalaĵoj: oficiala religio, arto, scienco, metio: eklezio, muziko, kemio, industrio, komerco. Por strangaĵoj: universala lingvo en neniu lando postulata, nur stranguloj okupiĝas, priokupiĝas. Universala lingvo estas angla kun dolaroj kaj sterlingoj, literaturo kaj scienco, postulata en ĉiuj Kontinentoj.

Sen La Espero kaj La Vojo, malforta estus Esperanto. Sen animo ne estas lingvo. Certe malsukcesas en Esperantujo ne Esperanto sed malbonaj esperantistoj.

JUNAJ KAJ MALJUNAJ

Oni multe diskutis pri juneco kaj maljuneco ĉe homo, kaj oni povas senfine diskuti, tiuteme, ĉar senfinaj estas la aspektoj kaj gradoj intermiksitaj de jun- maljuneco: estas infanoj seriozaj kiel maturaj homoj, kaj mezaĝuloj ridemaj, ludemaj kiel infanoj. Kondiĉoj de junulo estas vigleco, entuziasmo, imagemo, malavareco, fidemo. Ĉe junulo viveco estas abunda kaj li ĝin verŝas entrepreneme eĉ senatente pri riskoj aŭ danĝeroj. Ĉiuj entreprenoj saĝnas al li facilaj, sukcesigeblaj, belaj, altiraj. Li sin donas al ĉio entuziasme, optimisme eĉ kuraĝe bataleme. Elreviĝoj,

seniluziigoj sekvigas pripensemon, zorgemon, malrapidemon. Pli ol amemo, kreskas, poste, mastremo, ordonemo, ambicio por potenco, riĉeco. Ju pli multe mezaĝulo, maljunulo, posedas, des pli multe volas atingi. Li fariĝas avara, egoista. Ĉi tiuj kondiĉoj ĝenerale karakterizas maljunulon.

Sed en Esperantujo, militanta samideano, paca batalanto, eĉ plej maljuna, estas pli juna ol junulo baldaŭ laciĝanta, malesperema, ĉu pro timo al ridindiĝo aŭ al senprofita klopodado. Kun ni longe, porĉiam, restas nur saĝaj junuloj kaj junaj saĝuloj. La naivulo kredema ke ĉiuj homoj tuj fariĝos iaj anĝeloj sekvemaj, obeemaj, ĉar li malkovris kaj iomtempe predikas la Esperantosolvon, la naivulo kiu forgesas siajn proprajn malkapablojn kaj malbonemojn kredante sin obeema al ĉiuj saĝuloj, tiu neeviteble baldaŭ abomenos ke la homoj — la aliaj, ne li! — estas stultaj, malsaĝaj, ne indaj ke iu strebadas por ilia bono. Ĉu ni ĉiuj ne estas stultaj, malsaĝaj, pri iu afero aŭ alia, pri iu temo aŭ alia? Ĉu ni multaj ne bezonas longan tempon por konscii aŭ kompreni ion, kio por aliaj estas tre simpla? Ĉu ni ĉiuj ne aperis pli-malpli sovaĝaj, hipokritaj, malhonestaj eĉ pri faroj por kiuj ni sentis bonfidon? Ĉu ne estas universala diro pri homo, ke li agis lupe en ŝafida vesto? Ankaŭ iu agadas ŝafide en lupa vesto! Kial ni pretendu ke tuj estu komprenota nia celo, nia bonvolo, nia praveco? Ke la kompleksa homaro tuj lernu Esperanton? Kaj tuj venu al ni beno?

Jes, nur saĝe junaj kaj june saĝaj homoj pri nia afero restas dumvive en niaj vicoj. Idealismo, entuziasmo, optimismo, sindonemo — juneco! — Seriozeco, bonfido, pacienco, persistemo — saĝeco!

Ni kore memoru eminentajn samideanojn kiuj estis niaj pioniroj antaŭ kvardek-kvindek jaroj, kiuj ankoraŭ gvidas nin fidele al nia celo. Ili estas saĝaj, inteligentaj, konsciaj, pri nia afero, pri homara naturo — honorindaj esperantistoj. Kaj ĉiuj humilaj samideanoj eltenantaj dumvive en Esperantujo pro amo al homaro estas pli honorindaj ol iama pioniro velkinta, malvenkinta! — Hazarde mi konstatis heroan laboradon de franca Dronchat kaj de aŭstralia Banham por nia afero. Nekonataj, tiaj herooj estas multaj en Esperantujo. Sekretaj fortoj de nia movado!

POR PAROLIGO:

Kial Esperanto povas esti juste ĉies?

Ĉu Esperanto havas ian lingvan kaj homaran spiriton? Kian?

Ĉu vi diferencigas inter *spirito* kaj *interna ideo* de Esperanto?

Ĉu paco kontraŭ justeco estas laŭdinda?

Kion vi pli ŝatas: *gustan* aŭ *justan*?

Kiel vi opinias la nomon *Esperanto* por internacia lingvo?

Ĉu vi konsideras la genion de Zamenhof, precipe *magia*
aŭ *logika* ?

Ĉu vi estas senfine esperema ?

Ĉu homaro baldaŭ ŝanĝas morojn ?

Ĉu lingva ŝanĝo estas simpla afero ?

Ĉu vi opinias ke nacia lingvo influas por nacia spirito ?

Ĉu eminentulo pri iu arto aŭ scienco estas eminentulo pri
ĉiuj ordinaraj aŭ simplaj aferoj ?

Ĉu vi bonvole rekonas viajn erarojn aŭ trompiĝojn ?

Ĉu nura logiko, argumentado, estas ĉiam profunde efika ?

Ĉu forto estas ia argumento ?

Ĉu iam forto konvinkis vin ?

Ĉu vi preferas venki aŭ konvinki homon ?

Ĉu viaj samhejmanoj opinias pri Esperanto, kiel vi ? Ĉu vi
povas ilin konvinki ?

Ĉu « La Espero » kaj « La Vojo » efikas por Esperanto ?

Ĉu vi diferencigas korpan junecon kaj spiritan ? Kiun vi preferas ?

Ĉu vi estas ludema aŭ ripozema ? Kial ?

Ĉu vi estas ridema aŭ ploreme ? Kial ?

Ĉu vin influis travivitaj seniluziigoj ?

Ĉu vi estas esperantista veterano ?

Ĉu vi konas iun tian ?

Ĉu vi intencas dumvive klopodi por Esperanto ?

Ĉu vi estas ŝanĝema aŭ persistema ?

Ĉu vi persistas, se vi konscias ke vi trompiĝis kaj malprave senriajte aŭ maljuste agas ?

Ĉu vi iam sovaĝis aŭ hipokritis ?

Ĉu vin kapablas ŝajnigi vin ŝafo por sekcesigi lupan agon de vi ?

Ĉu ofte oni ŝajnigas sin lupo kaj agas kiel ŝafo ?

TAMEN, ANTAŬEN

Apud nia movado por solvo de lingva interkomprenado universala moviĝadas interlingvistoj serĉantaj la solvon. Tio ja ne estas novaĵo! Ĉu ili nun ŝanĝas la etiketon, sub kiu ili agadis ĝis la faŝista milito, la fakto estas la sama.

Profesiaj lingvistoj ne ŝanĝas la fakton ke Zamenhof, tute ne konata antaŭ 70 jaroj, solvis plej gravan lingvan problemon, kaj ke tiu solvo venkadis, dum 60 jaroj, ĉiujn solvoprovojn de eminentaj filologoj, eĉ kiam ili profitis el la Zamenhofaj vojoj.

Mi konas tiajn eminentulojn pri lingvoj kaj lingvistiko, filologio, gramatiko, poligloto: aŭ ili nur asertas ke Esperanto estas utopia solvo, fuŝaĵo de malkompetenta homo, aŭ ili evidentiĝas senpotencaj rivaloj de Zamenhof. Tamen ne iras nian vojon, ni homoj el ĉiuj landoj kaj linvoj interkompreniĝas lingve per Esperanto, kaj eĉ pli profunde: per internacia, interpopola, interhoma amsono, fratemio.

Aliflanke, ĉu ni, ĉu en nia movado, ne estas gramatikistoj, filologoj, lingvistoj, poliglotoj? Ĉu nur tiaj estas, kiuj ankoraŭ kredas laŭ tradiciaj antaŭjuĝoj ke nur nacia aŭ klasika lingvo estas lingvo, aŭ kiuj kredas ke ne estas trafa solvo se ne ili ĝin

kreis? Ni sentas kaj pensas, kiel Zamenhof — noblega ekzemplo de aŭtoro!, ke ni ĉesos labori por Esperanto, kaj senkondiĉe lernos iun ajn konkurantan planligvon, se *montriĝos ke tiu havos pli da ŝanco ol Esperanto fariĝi universala*. Sed hazarde povas okazi ke en la mondo estas kelkaj esperantistoj kiuj ankaŭ dum kvindek jaroj fariĝis lingvistoj, filologoj kaj hazarde konstatis multajn malsukcesojn de solvoj kreitaj de oficialaj eminentuloj kontraŭ la *popola Zamenhofaĵo*. Hazarde povus okazi ke Zamenhof estis genio kiel Kristoforo Kolumbo aŭ J. S. Bach.

Dum ni atendas tiujn klarigojn, ni popole, homare, universale laboru por Esperanto, kiu montriĝis plej efika, ĝenerala kaj facila solvo lingva kaj senta! Kaj tial des pli kuraĝe de nun, ĉar spertado estis pli longa, pli evidentiga por nia lingvo, por nia literaturo kaj nia solidareco. Neniam ni estis tiel firme kaj bone organizitaj kiel nun. Eĉ la Akademio de Esperanto povas dormadi, ĉar tiel spontane bone evoluas Esperanto. Cetere, ĉiuj lingvaj Akademioj povas dormadi dum periodoj pli-malpli longaj, kiam la respektivaj lingvoj estas sanaj kaj fortikaj, kaj tute ne bezonas kuracistojn!

(Verkita en 1954)

Faru demandaron por paroligo pri la antaŭa teksto.

SPIRITA FUNDAMENTO KAJ LINGVA AMPLEKSEBLO

En multaj lingvoj estas esprimoj, kiuj taŭgas kaj por plej alta kaj por plej malalta celo, signifo, senco. Memoru eĉ se nur *ci, thou, tu*, por vokado kaj al Dio kaj al servisto, infano aŭ besto. Ĉu ankaŭ Poezio estas plej elementa kaj plej alta kaŭzo kaj celo por lingvo? Ĉu ne por skriba lingvaĵo, Arto ankaŭ estis komenco? Ĉu *sublima* ne estas *sube lima* kaj *super lima*? Ĉu *sublimi* ne sencas pasigi korpon de solida—plej peza—al vapora—plej malpeza—de pleja falemo kaj statikeco al pleja altiĝemo kaj moviĝemo?

La kataluna verkisto Noel Clarassó komparis poezion al vivo: ambaŭ plej simplaj kaj malsimplaj; poezio—li ankaŭ asertis—estas, kiel vivo, nediskutebla—vivo aŭ vivaĵo, poezio aŭ poeziaĵo.

Modernaj esploroj pri poezio, fare de profesoro F. B. Bateson konkludigas, ke ĉefa poezia afero estas poezia senco, kontraŭ kredo ke poezion konsistigas precipe ritmo kaj rimo—muziko de frazoj aŭ vortoj. Do, poezia senco—amo kaj deziro,

sufero kaj espero—estas fonto de lingvo por vivado, fonto de vivo por lingvo,

Sekve, se dum la lastaj cent jaroj aperis multaj provoj por internacia lingvo, kaj nur Esperanto atingis grandan movadon, tiu fakto kredigas ke nur Esperanto estas bona, la sola internacia lingvo kiu naskiĝis poezie:

MALAMIKETE DE LAS NACJES
KADÓ; KADÓ, JAM TEMP' ESTÁ!
LA TOT' HOMOZE IN FAMILJE
KUNUNIGARE SO DEBÁ.

Kaj poezie renaskiĝis:

FORTE STARAS MUROJ DE MILJAROJ
INTER LA POPOLOJ DIVIDITAJ;
SED DISSALTOS LA OBSTINAJ BAROJ
PER LA SANKTA AMO DISBATITAJ.

Poezio—kaŭzo kaj idealo—poezia senco—amo kaj deziro, sufero kaj espero: spirita fundamento de Esperanto.

Oratoroj kaj verkistoj postulas solvojn, kiuj ŝajnas tute superflujaj, eĉ ne pravigeblaj de ordinara homo. Zamenhof antaŭsentis, certe mem sentis, tiajn postulojn. Kaj tial li havigis sintaksan liberon dank' al akuzativo montrebla per finiĝo, kaj li permesis, eĉ se plej escepte aŭ malofte, idiotismojn. Li profunde komprenis homan, lingvan, naturon. Tio, kion plenaĝa Clarassò eldiris en 1955, plene regis en la spirito de Zamenhof

tre juna, kiam li kreadis internacian lingvon: poezio—lingvo—plej simpla kaj plej malsimpla—kiel vivo.

Kiu ne kapablas gramatike elklarigi akuzativon per vortofinigo sed nur per frazkonstruo, tiu diru ĉiam *mi vidas Petron*; kiu kapablas ĝin signi, tiu meritas liberon por *Petron vidas mi, Petron mi vidas, Mi vidas Petron, vidas mi Petron, mi Petron vidas*. . . Tia libero permesas nuanciĝi laŭ fonetiko, emfazo, tono, milokaze en parolado kaj verkado.

Kiu ne aŭdas diferencon inter meztona kaj mestona, tiu ne bezonas skribi vokalon inter *z* kaj *t* por eviti ke la senvoĉa *t* senvoĉigu la antaŭan *z*—ĝin soigu. Kiu rimarkas tian danĝeron kaj deziras eviti sonan konfuzon inter *rozsimila* kaj *rossimila*, tiu povu elekti *rozosimila* kaj *simila al rozo*.

La Zamenhofs libereco kaj pardonemo en Esperantujo, estis genie saĝaj. Simpluloj, teknikistoj, poetoj, ĉiuj trovu en Esperanto sian lingvon, en Esperantujo sian medion, sian vojon. Ĉu ni ĉiuj en nia propra, nacia, gepatra lingvo ne aŭdas kaj legas ĉiutage erarojn plej diversajn? Ĉu ni, malnovaj esperantistoj, ne legis, aŭdis, mem faris plej diversajn erarojn en nia internacia lingvo? Ĉu, tamen, nia gepatra kaj nia helpa lingvoj, ne bone evoluis malgraŭ ĉies eraroj kaj fuŝaĵoj?

Ni hodiaŭ konstatas ke Downes komentas la Fundamentan Krestomation, Manders la Downes'ajn rimarkojn; kaj Zamenhof, Downes kaj Manders estas ĉiuj pravaj,—kiel malsamopiniaj gramatikistoj kaj vortaristoj en ĉiuj linvoj.

Diskutoj pri *-ata*, *-ita* en Esperanto estas kompareblaj al tiuj pri «dije» (= mi diris) kaj «he dicho» (= mi estas dirinta) en hispana lingvo; pri tiu punkto kaj pri multaj, senutile kaj utile

oni povas senfine argumenti. Fine oni devas konkludi, ke ĉiu bona parolanto kaj ĉiu bona verkanto en ĉiu lingvo plej klare esprimu sian penson, sian ideon, por atingi plej korekton gramatikecon.

Literaturistoj postulas flekseblan kaj riĉan aŭ riĉigeblan lingvon, precizigeblon kaj nuancigeblon.

Cervantes verkis sian Don Kihoton pri *caballero*, derivita el *caballo*. Tamen li ne povis uzi nur la vorton *caballo* por la ĉevalo rajdata de la *caballero* Don Kihoto. Kaj la hispana lingvo bezonis por nuancigo: *rocin*, *rocinante*, *penco*, *jamelgo*, *hamelgo*, *jumento*, *chalate*, *alazán*, *alhamel*, *corcel*, malgraŭ ebleco almeti sennombrajn suplementojn por komprenigi precizigojn kiel *caballo de carrera* (= kurĉevalo), *caballo de carga*, (= ŝarĝĉevalo), *caballo de montar* (= rajdĉevalo), k. c.

En kataluna lingvo ekzistas por *stulta*: *beneit*, *ximple*, *bonifaci*, *pau*, *babau*, *banau*, *pastanaga*, *bleda*, *capsigrany*, *lluç*, *ruc*, *talòs*, *llonze*, *sabatot*, *estaquirot*, *encantat*, *gamarús*, *pallús*, *tarambana*, *tarumba* k. a. krom frazaj esprimoj.

Literaturisto ne rezignas akribi nur per malmultaj aŭ tre ĝeneralaj, ordinaraj, vortoj: apud *malriĉa* kaj *kompatinda*, li bezonas povra. Apud *kuracilo* kaj *medikamento*, apotekisto bezonas ankaŭ vortojn *pilolo*, *plastro*, *ŝmiraĵo*, *pulvoroj*, *laksigilo*, *balzamo* k. t. p. Tiel ĉiu fakulo. Estas ankaŭ la universala influo aŭ forto de vortoj: *familiars*, *populara*, *ekvivalenta*, kiuj sin trudas apud *familieca* kaj *familia*, *popoleca* kaj *popola*, *egalvalora*. Ĉu eviteblaj aŭ evitindaj?

Kiam, antaŭ la V.^a Universala Kongreso en Barcelona, 1909, nia pioniro kaj elstara verkisto Pujulà, lerte, klare kaj

fervore propagandis kaj instruis Esperanton en Barcelono, li varbis faman literaturiston Joaquim Ruyra, kaj tiam tre junan hodiaŭ plej elstaran poeton kaj profesoron Carles Riba. La unua, antaŭ jaroj forpasinta, sed daŭre konsiderata plej bona katalunlingva aŭtoro; la dua, hodiaŭ fama tradukinto de grekaj klasikaj verkoj al kataluna. Ambaŭ tiam trovis Esperanton ne sufiĉe riĉa por literaturo. Se tiam ekzistus almenaŭ la Plena Vortaro kaj la nuna bibliografio, eble ambaŭ definitive restus en Esperantujo. Simile ni povus konstati en multaj landoj rilate al verkistoj kaj sciencistoj eklernintaj nian lingvon.

Tamen, enkonduko de multaj neologismoj aŭ «poeziaj vortoj» prezentas du danĝerojn: a) poemoj estos malfacile komprenataj kaj tial ili altiros malmultajn legantojn; b) diversa kompreno kaj uzo de tiaj vortoj—ekzemple, hispanoj komprenos kaj uzos *turpa* sence de *mallerta*, *malvigla*, dum por italoj ĝi sencos *malhonesto*, *malpura*, por aliaj ĝi signifos *malbela*. Ni memoru ke male: amase, la tuta esperantistaro facile kaj ŝate legis kaj komprenis la poemojn de Zamenhof, Grabowski k. a., sendanĝere al malĝusta kompreno de *mallerta*, *malvigla*, *malhonesto*, *malpura*, *malbela*.

Ni devas esti kuraĝe konsciaj pri ĉiaj veraĵoj rilataj al nia afero. Feliĉe, nia movado post la dua terura milito, multe fortikiĝis, kaj la sukceso ĉe Unesko devigas nin pli kaj pli serioze ĉiuflanke servi al nia afero.

Kiel eminente nin reprezentis Edmond Privat ĉe la Ligo de Nacioj, nun nova eminentulo, Ivo Lapenna, defendas Esperanton ĉe Unesko.

Ke mil semoj perdiĝas, estas por la bonaj samideanoj kaŭzo resemi konstante.

Se por sama signifo eniris nian lingvon *strando* kaj *plaĝo*, apud *banejo*, *marbordo*, *riverbordo*, *marbanejo*, *riverbanejo*, ni simple elektu plej bone laŭ cirkonstancoj, konteksto, por precizigo aŭ belsoneco. Arkaikiĝos aŭ malaperos ĉu *plaĝo* ĉu *strando* post vorta batalo; aŭ restos ambaŭ pro eventuala nuanciĝo aŭ utilo en nia lingvo. Ni estu skrupulemaj, singardemaj, sed ne ektimegu tuj, kiam nian lingvon atakas malsaneto, malpuraĵo, erareto, fuŝeto. Homaj difektoj estas naturaj, neeviteblaj, sed traviveblaj. Kontraŭe, se ni volas absolute perfektigi lingvon, ni ne povas paroli; ĉar ni ne estas dioj, sed homoj. Se ni volas absolute purigi aeron, ni ne povas spiri, ni bezonas teren, surteran aeron, ĉar ni estas ne ĉielanoj sed teranoj.

Esperanto estas lingvo kun spirita fundamento por homoj.

Faru demandaron por paroligo pri la antaŭa teksto.

SENY

Kiam movado estas komenca, malriĉa kaj malforta kiel la nia, ankoraŭ, saĝo estas nepre necesa por eviti malprogreson.

Granda sinjoro estis Zamenhof, kaj tial tre saĝa: ĉiam komprenema, pacienca, pardonema, tolerema, antaŭvidema, singardema.

Ĉe la konantoj de latindevenaj lingvoj, fama estas la kataluna vorto *seny* el *senyor* (= *senior* = *sinjoro*) el *senex*.

La konsona fonemo *ny* (= *nj*) estas ofta ĉe vortfino en kataluna lingvo: *arenys*, *ferreny*, *company*, *muny*, *bony*; kaj tial ebligis vortiĝo de *seny*, kiu alprenis sencon de saĝo, prudento, spertinteco, kvalitoj karakterizaj de vera, ideala, «Sinjoro».

Tiu katalunlingva tre elstara vorto iel kredigis ke ni, la katalunoj, havas la vorton, ĉar ni havas la esprimatan kvaliton, kvalitaron, de *seny*. Tiel konkludus ankaŭ Humboldt kaj aliaj lingvistoj. Certe estas ia influo de la vorto al la uzantoj kaj de ĉi-tiuj al la vorto, sed fonetika ebligado por ĝi en kataluna lingvo plej multe efikis por ĝia estiĝo.

La katalunaj esperantistoj, kaj ĉiuj samideanoj en la mondo, devas esti saĝaj kiel estis nia Majstro por faciligi la funkciadon kaj progresadon de nia movado. Ni ĉiuj estu bonvolaj, evitemaj pri ĉiaj baroj, kiujn povas okazigi ni mem kontraŭ nia afero pro nia manko de *seny*—saĝo. Kiom da malbono kaŭzis al homaro malsaĝaj eminentuloj kaj eminentaj malsaĝuloj!

Kompreneble, malfacile estas ŝanĝi nian karakteron, temperamenton, personecon. Sed atentemo, bonvolo, ja povas iel efiki.

ESPERANTO, NATURA LINGVO

Ju pli daŭras Esperanto, des pli ĝi naturiĝas eĉ en nia teoriado. Antaŭ jardekoj, ni ĝenerale konsentis ke nia lingvo estas artefarita. Poste, iom post iom, ni trovis ĝin pli kaj pli natura: tial ke ĝiaj elementoj estas eltiritaj el naturaj lingvoj, tial ke ĝi evoluas idente kiel naciaj lingvoj, tial ke ĝi estas trovata logika, facila, familiara, intima.

Sed estas fakto, kiun mi ne vidis ĝis nun elstarigita, kiu eble tion meritas.

Mi vere intime konas nian movadon nur en Katalunujo. Tamen, eblis al mi konstati ke estas samideanoj kiuj pli nature, pli facile, pli korekte, pli elokvente parolas, paroladas aŭ verkas en Esperanto ol en sia hejma, gepatra, lingvo: Gumà, Alberich, Masachs, Solà, Hernández. Poetoj kiel Artur Doménech kaj Grau-Cases estas tute nekonataj pro verkadoj en nacia lingvo. Ĉu ne same okazas en aliaj landoj? Ĉu, ekzemple, Baghy kaj Kalocsay ne pli bone, facile, nature verkis en Esperanto ol en sia gepatra lingvo? Ĉu en Aŭstralio kaj Finnlando, en Francujo kaj Anglujo, en Nederlando, Polujo, Helenujo kaj aliaj landoj ne okazas same, ne fakte ke iuj esperantistoj pli spontanee kaj facile parolas, paroladas aŭ verkadas en Esperanto ol en sia nacia lingvo?

Se tia fakto estus principe konstatebla kiel internacia, eble interese estus profunde enketi kaj ĝin pristudi.

Kion vi observis, kion vi scias tiurilate, pri viaj landoj samideanoj?

POST LA VENKO

Iom post iom, ni ĉiuj pli profunde konsciiĝas pri nia afero; pli klare kaj pli perspektive ĝi aperas al nia kompreno.

Kiam ni antaŭvidas definitivan venkon, ni antaŭsentas malaperon aŭ velkon de esperantista kunfrateco: se ni ĉiuj povos ĉien iri sen lingva malhelpo, se Esperanto funkcios ĝenerale, kiel interlingvo en la civilizita mondo, ne plu estos idealo atingi nian lingvan celon, ĝi estos atingita, kiel fakte nun ke ni povas interrilatiĝi kun britoj, usonanoj k. a. se ni parolas angle. Se ordinara estos uzado de Esperanto kiel dua lingvo, eĉ samsatanoj malsamlingvaj, kiel flandroj kaj valonoj, konsideros ĝin sia dua lingvo.

Kaj multaj ŝtatoj enhavas malsamlingvajn popolojn en la Malnova Mondo, kaj eĉ en la Nova — Kanado estas ekzemplo. Tiam la komuna dua lingvo ne estos pli amikiga ol la ceteraj komunaj internaciaj — rusa, hispana, angla, franca, germana, araba, k. a. Kaj ni scias ke lingva komuneco ne evitis militojn. Foje, paco kunvivis malsamlingvaj popoloj dum barbare intermilitis samingvaj. Komuna idealo pli efike unuigas ol komuna lingvo. Eĉ komuna intereso. Esperantista kunfrateco rezultas precipe el komuna idealo.

En ŝtatoj plurlingvaj, ni vidas pacon, kiam estas justeco interlingva; kaj malpacon, kiam regas trudo de unu lingvo kontraŭ aliaj. Ĉia maljusteco originas malpacon, ĉefe kiam homoj konsciiĝas pri la vero. Kaj ne estas bona argumento, ke homoj estu senkonsciaj.

Pli ol la lingvo mem, la justeco interlingva celata de esperantismo, per komuna dua lingvo por ĉiuj samrajta kaj samrajtiga, unuigas, kunfratigas nin tutmonde. Interlingva justeco en Svislando kaj Kanado unuigas enlandanojn, dum en aliaj ŝtatoj interlingva maljusteco malamikigas enlandanojn. Tial Zamenhof pli profunde inspiriĝis, ol nur pri lingvo. Li celis justecon, pli kompletan justecon, ol simplan komunecon lingvan, ol utilon de helpa lingvo. Li sentis pli grandan, pli profundan idealon: kunfratecon per justeco. Kaj kontraŭ la du grandaj baroj — superrego aŭ privilegio de unuj lingvoj super aliaj, kaj malfacila kompreneblo pro lingva malsameco — li klopodis por havigi al popolaro tutmonda neŭtralan komunan komprenigilon.

Pli fratece kunvivis, antaŭ la unua mondmilito, vizioj kun tri oficialaj lingvoj, ol belgoj kun unu oficiala lingvo. Kaj en ĉiuj nacioj aŭ ŝtatoj plurlingvaj, kie oni volis kunfratigi la samlandanojn, oni devis rekoni ĉiujn lingvojn. Se en lando ne ekzistas interlingva justeco, tie ne ekzistas spontanea aŭ profunda paco, ĉar maljusteco estas pli granda baro kontraŭ paco ol malsama lingvo. Eĉ samfamilianoj interbatalas, kiam iuj volas trudi privilegion kontraŭ aliaj.

Ĉefa celo de Zamenhof estis samrajtigo inter ĉiuj homoj kaj popoloj por paco ĝustomara. Tial lin obsedis homaranismo.

Redaktoro de «Boletín» bone konstatis, ke kiam ne regas interlingva justeco, io pli grava okazas ol malkapablo por interkompreniĝo: oni ne volas kompreni.

Nur idealo pri justeco interhoma daŭrigos, eĉ post nia lingva triumfo, nian esperantistan kunfratecon

IMPONA TRANSCENDO

Eĉ se temas pri realaĵoj «eksteraj», «objektoj», samaj objektoj estas tiel diferencaj al ĉiu homo kaj el ĉiu homo, ke ili estas prezentataj, pentrataj, ĉu laŭ Greko aŭ Van Gogh, laŭ Velázquez aŭ Picasso — senfine diferencaj. Ni devas akcepti kuraĝe, sentime, ke vivo aŭ mondo de homaro estas fluktua, evolua — diferenca laŭ epokoj, eĉ en sama epoko, laŭ skoloj kaj aŭtoroj. Ellerninte lingvon, parolado-verkado fariĝas arto, kiel pentrado, muzikado, dancado. Samepokaj, samnaciaj, samartaj Téniers kaj Van Dyck — kiel diferencaj la respektivaj pentraj dialektoj kaj dialektikoj! Lope de Vega kaj Cervantes, samepokaj, samlingvaj, eĉ samprovincanoj — kiel diferencaj la respektivaj personaj dialektoj kaj dialektikoj. Tamen, tiuj kaj ĉiuj pentristoj kreis la komunan pentrokulturon, kaj tiuj grandaj verkistoj kaj ĉiuj aliaj kastillingvaj kreis la kulturenan kastilan lingvon. Tute simile, idente, la grandaj esperantistaj verkistoj kaj oratoroj, ekde la Majstro, kreadas la Esperantokulturon kaj novan civilizacion, profunde komunan eĉ se niaj pioniroj aperas lingve tiel diferencaj kiel Privat kaj Kalocsay. Sub ĉiuj personaj pentraj dialektoj kaj dialektikoj, tiel diferencaj kiel tiuj de Caravage kaj de Greko, de Rubens kaj de Van Dyck, de Murillo kaj de Goya, estas la ko-

muna sento: ke blua koloro, ĉiela koloro, simbolas purecon, kaj ruĝa sangon kaj fajron. Tiel same sub ĉiuj personaj lingvaj dialektoj estas la komunaj zamenhofaj lingva fundamento kaj «nova sento» por interkompreno—animo de Esperantujo. Ni devas agnoski, kompreni, ke lingvo estas malpli objektiva ol materia, ekstera afero, kaj tial pli fluktua, kiel vivo, biologio, animo, psikologio. Sed tamen, per franca lingvo homaro kreis, interkomprene, eŭropan kulturon, kaj per angla, kaj per rusa—precipe naciaj lingvoj. Ĉu ne pli universale per Esperanto, precipe internacia? Do, ĉesu timoj, kaj antaŭen prudente, singardeme, saĝe!

Se per naciaj lingvoj estas kreitaj kulturoj, eĉ civilizacioj, per internacia lingvo kaj plenhomara spirito, la perspektivo ja estas universala. Eble ni mem, la esperantistoj, atenteme al cirkonstancaj problemoj de nia propaganda batalado, ne vidas la plenan transcendon de kulturo, de civilizacio per Esperanto. Eble nur per neŭtrala lingvo kaj plenhomara spirito povos estiĝi unufoje en la mondo tuthomara kunfratiga civilizacio.

Esperantujo naskiĝis, kreskas, evoluas plej normale: unue estiĝis amo—de Zamenhof al homaro, kontraŭ ĉi-ties viktimizeco videble okazanta pro lingvaj baroj. Konsekvence li suferis, oferis klopodon por solvo, rimedo. Sekve naskiĝis Esperanto kun animo kontraŭ malamikeco inter popoloj. Privat rakontis pri vivo de Zamenhof kaj esprimo de sentoj en Esperanto. Poste venis plena gramatiko kaj plena vortaro. Post Zamenhof: Kalocsay, Waringhien. Post Privat: Lapenna. Post amo, juro. Post Esperanto, esperantologio. Post rajtoj, forto.

Ni ankoraŭ ne venkis militeman, imperieman, homaron; sed

ni venkis krizojn, malsanojn, parodiojn el nia movado aŭ kontraŭ ĝi.

Ni povas nun preparoli ĉiujn lingvajn problemojn. Esperanto ja estas sufiĉe provita. Ni devas esti saĝaj sed kuraĝaj, kuraĝe saĝaj kaj saĝe kuraĝaj.

Neniam ekzistis civilizacio sur natura neŭtrala lingva fundamento. Kiam nacia lingvo kreis civilizacion, en ĝi estis imperia spirito. En esperantista homaro regas rezigno pri internaciigo de privata, de nacia lingvo; kaj eĉ nacilingve ni verkas laŭ internacia spirito. Do unuafoje en Homarujo proviĝas spirite internacia civilizacio. Jen transcendo de nia movado, kiun ni devas elstarigi, kiu fine efektiviĝos la belan revon de Zamenhof pri homaranismo.

Tia transcendo ja devas imponi al ni.

Faru demandaron por paroligo pri la antaŭaj tekstoj.

DIALEKTIKO, TEORIO — TEMPERAMENTO

Jacob Bronowski, M. A., Ph. D., laŭ esperanta traduko de Avoto en «HEROLDO», (febr. 1956):

«Teorioj pri la Universo logas nin, kiel ankaŭ siajn elpensintojn, ne nur racie sed temperamente. Eddington konfesis en 1931 ke, filozofie, la nocio de komenco de la nuna naturordo forte mallogis lin. Kaj Lemaitre komencis la unuan proklamon de sia teorio kontraŭdirante la vortojn de Eddington. La du temperamentoj jam neniam malaperis».

ATENTIGO

Kompreneble, mi ne nur plene konsentas, sed memoras kaj memorigas la Zamenhofan averton: «la Fundamenta Krestomatio povas servi al ĉiuj kiel modelo de esperanta stilo kaj gardi la lingvon de pereiga disfalo je diversaj dialektoj».

Tial mi petas bonvolu ne miskompreni la specialan sencon, por kiu mi uzis la vorton *dialekto* en ĉi tiu verko.

PERSONOJ ALUDITAJ

	paĝo		paĝo
Alberich	78	Domènech	78
Attlee	12	Downes	73
Avoto	84	Dronchat	66
Bach	70	Dyck	81
Baghy	57, 78	Eddington	73
Balmes	16, 17, 19	Eden	11
Banham	66	Eisenhower	27
Bateson	71	Emerson	3
Bean	46	Engholm	57
Benavente	49	Fabra	41
Benot	41	Faulhaber	49
Bevan	12	Gogh	81
Blaas	46	Gothe	34, 56
Blanquer	32	Goya	81
Bourlet	11	Grabowski	49, 75
Bronowski	84	Grau	11, 78
Brown	47	Greko	81
Cambó	34, 35	Gumà	78
Caravage	81	Jouvet	32
Carner	49	Heine	12
Cervantes	27, 34, 49, 74, 81	Hernández	78
Cholopov	22	Humboldt	16, 20, 77
Churchill	11, 22, 25	Jespersen	41
Clarassó	71, 72	Kabe	49
Colla	46	Kalocsay	46, 78, 81, 82
Collinder	46	Kant	6, 56
Collinson	46	Kawasaki	46
Coromines	41	Kolumbo	70
Croce	16, 18, 24	Lanti	11
Dante	27, 34, 41, 46	Lapenna	7, 75

	<u>paño</u>		<u>paño</u>
Lemaitre	84	Saussure	17, 41
Lull	34	Setälä	46
Lope	19, 81	Shakespeare	34
Manders	41, 73	Shaw	12, 23
Mao-Ce-Tung	27	Schwartz	11
Maragall	12	Sola	78
Masachs	78	Soldevila	60, 62
Marble	46	Stalin	22, 25
March	49	Stojan	41
Marr	22	Tolstoj	27
Moll	41	Urtiko	50, 51
Molotov	11	Valera	19
Montsant	31	Valéry	11
Murillo	81	Velázquez	81
Neergaard	46	Visinski	11
Nietzsche	12, 56	Vossler	12
Perón	11	Wajsblum	46
Picasso	81	Waringhien	46, 82
Privat	7, 46, 57, 75	Wiener	46
	81, 82	Wilson	6, 23
Proust	11	Wüster	46
Pujulà	75	Zamenhof	6,7,8,9,10,11
Ramstedt	46		12, 14, 15, 17,
Régulo	33, 46		18, 19, 26, 28,
Reiersol	46		41, 42, 43, 44,
Riba	75		46, 47, 49, 51,
Rubens	81		52, 53, 59, 61,
Ruyra	75		67, 69, 70, 72,
Sanchis	41		73, 75, 77, 80
			81, 82, 83

BONVOLU KOREKTI:

<u>Paĝo</u>	<u>linio</u>	<u>diras</u>	<u>diru</u>
1	1	dialektiko	dialektiko
6	3	comprenigi	komprenigi
6	22	comprenemu	komprenemu
9	21	legante	leginte
9	21	aŭdante	aŭdinte
9	22	imitante	imitinte
12	7-8	Nietzche	Nietzsche
14	14	spriore	apriore
20	15	Gumboldt	Humboldt
34	2	povis	povas
43	7	palatumi	voĉumi
46	5	Reieral	Reiersol
50	9	pliboniĝon	plibonigon
52	14	filologian	filologan
58	17	harmonia	harmonie
62	17	al	ol
67	2	aŭ	aŭ—
68	12	senrajte	senrajte
68	14	Ĉu vin	Ĉu vi
68	14	sekcesigi	sukcesigi
69	13	ne	ni
70	2	ke	—ke
77	11	de seny	je seny

INDEKSO

	<u>Paĝo</u>
Mia, via kaj ideala	5
Kredo kaj vero	8
Nacia kaj internacia	11
Filozofoj kaj filologoj	16
Politikaj solvoj	21
Angla, franca kaj Esperanto	25
Esperanto kaj pasiva poliglotismo	29
Lingvistiko kaj Esperantujo	41
Doktrino kaj lingvo	47
Danĝero kaj lingvistika leĝo	55
Justeco	59
Konstante frapante	63
Tamen, antaŭen	69
Spirita fundamento	71
Seny	77
Esperanto, natura lingvo	78
Post la venko	79
Impona transcendo	81
Dialektiko, teorio — temperamento	84
Atentigo	84
Personoj aluditaj	85
Bonvolu korekti	87

NOTOJ PRI LA ENHAVO

La manuskripto eniris la pre-
sejon en junio 1955, kaj
la libro publikigis
en aprilo
1956.

Prezo: 10 steloj

Rabatita por kursoj

Eld.: BELPOST, Apart. 5164, Barcelona

I